# STEL-AVIVO senpaŭze

KURIERO DE LA 85-a UK • Numero 1 • 25-an de julio 2000

## Bonvenon al Tel Avivo!

La varmon vi povas lasi ekster la kongresejo, sed ne la bonhumoron kaj la varman akcepton. Ni, la LKK estis laborantaj dum monatoj por tiu kulmino, por ke via surterigo en Tel Avivo estu kiel eble plej agrabla kaj senproblema,kaj ni esperas ke tiel efektive estis. La kongresa kuriero estos nia informilo, kaj ĝia nomo fidele reprezentas la kongresurbon: dum unu semajno la Verda Stelo gastos en Tel Avivo, jen do STelAvivo. La enloĝantoj de Tel Avivo karesnomas sian urbon "urbo sen paŭzo". Tial STel Avivo senpaŭze. Nome de la LKK mi esperas ke dum la venonta semajno vi senĉese ĝuos la verd-stelan vivon en Tel Avivo !

Amri Wandel

## PROGRAMŜANĜOJ

KONGRESA TEMO 2 (Wandel) ŝoviĝas unu horon pli poste kaj okazos la 27-an de la 14h30 ĝis 15h30 h en la salono Hodler.

LA POTO: Pro la limigita kvanto da spektantoj necesas akiri (senpagajn!) biletojn por la teatraĵo "La poto", kiu okazos: vendredon je la 20h00 en la salono Zamenhof kaj dimanĉon je la 16h00 en la salono Cvetkova (domo Ŝalom Alejĥem). La biletojn oni povas ricevi ĉe la Informejo.
La busoj al la domo Ŝalom Alejĥem ekiras de la Kongresejo je la 15h00 .

AKCEPTO POR LA MEMBROJ DE SOCIETO ZAMENHOF okazos duonhoron pli poste, je la 19h00 (vendrede) en salono Olswanger.

## INTERKONATIĜU SURPLAĜE

Kiel menciite en la Kongresa Libro, paĝo 17, la Interkona vespero ĉi-jare konsistas el du partoj: la unua estas la ordinara interkonatiĝa parto kiu okazos en la salono Zamenhof, kaj la dua okazos en la ĝardeno Charles Klor vid-al-vide de la Kongresejo ekde la 21h00 ĝis la noktomezo. Necesas aĉeti anticipe enirbileton ĉe la Informejo kiu funkcios ankaŭ vespere. Por la prezo de 50 sikloj vi ricevos laŭplaĉan tipan manĝon kaj trinkaĵojn kaj la amuzigajn anekdotojn kaj belegan pejzaĝon de malnova Jafo.

## Saluto de la vicurbestro de Tel Aviv-Jafo, s-ro Natan Wolloch

Nome de la urbo Tel-Aviv-Jafo kaj persone, mi ĝojas saluti la Universalan Kongreson de Esperanto, kiu unua-foje gastas en la unua hebrea urbo. La urbo Tel Avivo naskiĝis antaŭ naŭdek jaroj, ne longan tempon post Esperanto.

Ni tre ĝojas gastigi la Universalan Kongreson en nia urbo, kaj esperas ke tiu elekto montriĝos ĝusta kaj sukcesa.

Vi certe scias ke ĉefa strato en Tel Avivo portas la nomon de d-ro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kiu estis judo kaj cionisto. Tiu strato estas konata al nia publiko pli ol aliaj stratoj, ĉar tie situas centra medicina instituto kiu servas milojn.

La movado de Esperanto estas por la valoroj de paco, homaj rajtoj kaj aparte la rajto uzi kaj eduki per la nacia lingvo – valoroj kiuj speguliĝas en la temo de la kongreso en Tel Avivo – "Lingvo kaj kulturo de paco".

La enloĝantoj de Tel Avivo salutas vin pro via internacia agado.

Mi deziras al la partoprenantoj de la okdek kvina kongreso de Esperanto en Tel Avivo fruktodonan laboron kaj ĝuon de la multaj turismaj kaj kulturaj travivaĵoj ofertataj de mia urbo, kies slogano estas "urbo sen paŭzo".

## Mesaĝo de Prof. Naomi Ĥazan, vicprezidantino de la Israela Parlamento.

Estu bonvenaj al Israelo. La esperantistoj kunportas al la unua Universala Kongreso de la nuna miljaro ne nur la provon eltrovi universalan lingvon kiu faciligu la internacian komunikadon, sed ankaŭ fortan volon krei ponton trans la diferencoj naciaj kaj etnaj. Tia mesaĝo de interhoma amikeco estas speciale grava en nia regiono, kaj speciale nun, kiam ni troviĝas antaŭ gravegaj decidoj kiuj restrukturos nian estontecon kaj la estonton de nia regiono.

Mi deziras al vi fruktodonan laboron kaj sukceson en la evoluigo de komunikado inter la homoj ĉie tra la mondo.

Salute,

Prof. Naomi Ĥazan

---

## Saluto de s-ro Josi Sarid, eksministro de kulturo

Saluton!

Mi dankas al la honora komitato de la monda kongreso de la parolantoj de Esperanto, kiu okazos en Israelo kaj mi esprimas mian konsenton pri tio.

Bedaŭrinde mi ne povos esti kune kun vi ĉe la malfermo de la kongreso, kaj do mi petas transdononi al vi al viaj amikoj en la organiza komitato kaj al ĉiuj partoprenantoj de la kongreso, el Israelo kaj el eksterlando, miajn bondezirojn kaj gratulojn por via sukceso.

La tuta mondo, inkluzive Israelon kaj mezorienton bezonas treege la lingvon Esperanto kaj la tiom gravan mesaĝon, kiun ĝi disvastigas inter la homoj.

Mi bondeziras vin pro via decido okupiĝi en tiu ĉi kongreso pri la kunvivado inter judoj kaj araboj en Israelo, tiel sur la regiona kampo, inter ni kaj niaj najbaroj, kiel sur la interna kampo inter judoj kaj araboj, civitanoj de Israelo. Okupiĝu en viaj debatoj pri la manieroj helpi vin per la kulturo kaj la lingvo kiel rimedo por edukado al paco, kunekzistado, toleremo, interkomunikiĝo kaj kompreniĝo inter kaj ene de popolo kaj naciaj, ŝtataj kaj establaj.

Mi havas nenian dubon, ke vi trovos en la ŝtato Israelo kaj en la israela socio unikan kaj specialan laborgrupon en kiu vi povas agi kaj apliki viajn planojn.

Ni, en Israelo bezonas vin treege kaj ĝojas helpi vin laŭ nia plejeblo.

Via, Josi Sarid

# REVENFLUGOJ

Kongresanoj kiuj mendis transporton al la flughaveno bonvolu NEPRE viziti la giĉeton Loĝiga servo aŭ/kaj Ekskursoj por informi pri la detaloj: dato, dato de reflugo, horo, flugmaniero, hotelo de kie oni ekas, horo de la starto de la hotelo. Sen tio ne eblas organizi la transporton kaj LKK ne respondecas pri eventuale neuzota servo.

# TRANSPORTO, HOTELOJ, KONGRESEJO

Eblas aĉeti SEMAJNAN transportbileton inter la hoteloj (Metropol, Top, Tal, Moss, Adiv, Sun Bat Jam). Ne eblas aĉeti TAGAJN biletojn, sed nur semajnajn. La biletoj kostas 40 USD kaj estas aĉeteblaj ĉe la Informejo.

La busoj ekiras je la 8h00 de la hoteloj (eventuale necesos atendi iomete) kaj reiras de la Kongresejo al la hoteloj je la 18h00.

# LASTAJ ALIĜOJ

| | | |
|---|---|---|
| 1168 | lijo-p | **S-ino Lilia Ionkova**, ˝.K. Levski-G Blok 30; BH A; Ap. 30, BG-1836 Soßa, Bulgario |
| 1169 | kuch-s | **S-ino Barbara Kucharska**, Sobiesiaka 59/23, PL-42-606 Tarnowskie Góry, Pollando |
| 1170 | igse-p | **S-ro Ivan Georgiev Sergiev**, Dame Gruev 45, BG-2790 Jakoruda, Bulgario |
| 1171 | vmal-i | **Dipl. inĝ. Veikko Mäki-Luopa**, Paasitie 20 A, FI-00830 Helsinki, Finnlando |
| 1172 | dmnu-z | **S-ino Anna Dumanska-Uócsowska**, ul. Dobra 29/6, PL-00-344 Warszawa, Pollando |
| 1173 | etra-i | **Eduardo Trápani**, Casilla de Correo 1040 Cavia 2724/103, UY-11000 Montevideo, Urugvajo |
| 1174 | lfbu-a | **S-ro Alain Laufenburger**, 895-0012 Kagoshima ken Seandai-shi, Hirasa-Cho, 4191-5, Japanio |
| 1175 | cwik-p | **S-ro Michael Cwik**, Sijsjeslaan 22, BE-3080 Tervuren-Moorsel, Belgio |
| 1176 | snfl-r | **S-ino Sunfloro Birkeli**, Kyrkjegata 11, NO-4200 Sauda, Norvegio |
| 1177 | oian-y | **S-ino Stoianka Stoilova Stoianova**, z.k. Lulin 5 Blok 509, vh B, ap 21, BG-1359 Sofio, Bulgario |
| 1178 | nmsl-e | **S-ino Namsook Lee**, Chung Wonjo Naturkuracejo Kwangmyong2-dong, 50-5, Kwangmyong-si - 423-012, Korea Resp. |
| 1179 | fsel-g | **S-ro Frank Selten**, Butzbacher Str. 46, DE-60389 Frankfurt/Main, Germanio |
| 1180 | kesa-l | **S-ro Karl-Ernst Salzmann**, Zweibrückerer Str. 37-39, DE-76829 Landau, Germanio |
| 1181 | mbha-i | **S-ro Mark B. Haskell**, 1508 Highcrest Cir, Valrico FL 33594, Usono |
| 1182 | thks-e | **S-ro Thomas K. Smith**, 9906 Branford Ct., Riverview 33569, Usono |
| 1183 | mosg-z | **S-ino Maja Orsag**, Generalturist, Kongresni odjel Praŝka 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio |
| 1184 | zsza-p | **S-ino Zsuzsanna Gulyás**, Rákos u.98 I.9, HU-1155 Budapest, Hungario |
| 1185 | mbea-u | **S-ino Maria Bea V. Hoekstra**, 65 B Strout Green Road, London, Britio N4 3EG |
| 1186 | kdeg-o | **F-ino Cristina de Giorgi**, Via L. Pera 10, IT-56100 Pisa, Italio |
| 1187 | mybo-x | **S-ro Myron A. Bondelid**, 3143 Goldenspur Drive, Camarillo CA 93010-1621, Usono |
| 1188 | sdav-r | **S-ino Danit Ŝaĥar**, d.k.336, IL-38935 Givat-Ĥajim-Iĥud, Israelo |
| 1189 | iint-g | **S-ro Iino Takashi**, Honmachida 812-7, Machida-shi, Tokyo, 194-0032, Japanio |

# INFANVARTEJO

Dum la tuta kongreso funkcios infanvartejo de la 9h00 ĝis la 17-a en Danilando apud la naĝejo. Informoj en la Informejo.

Ĉiuj kongresanoj bonvolu transdoni la tekstojn por sekvontaj numeroj de la kongresa kuriero en la SALONO TVAROZEK ĉiutage ĝis la 14h00 por eniri en la numero de la sekvonta tago.
Ni petas vin konsideri la fakton ke la kongresa kuriero estas paĝe limigita kaj ke la redakta stabo decidos pri publikigo aŭ mallongigo de viaj tekstoj.

# STEL-AVIVO senpaŭze

KURIERO DE LA 85-a UK • Numero 2 • 26-an de julio 2000

## AL-VOKO KAJ PRO-VOKO DE AMANO

Por plenumi la celojn de Esperanto necesas alfronti konfliktojn kaj antaŭjuĝojn kaj utiligi la lingvon por krei kondiĉojn de paco kaj kompreniĝo.

Tiucele ni, partoprenantoj de la 1-a Seminario por arabaj esperantistoj en Amano, Jordanujo, de la 22-a ĝis la 24-a de julio 2000, diskutinte pri la temo "Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj", proponas al la membraro de UEA la jenajn realigindajn punktojn:

1) UEA okupiĝu pri disvastigo de Esperanto precipe en landoj, kie ne ekzistas lokaj fortoj;

2) Niaj fortoj estas limigitaj kaj sekve ni koncentru nian agadon ĉefe (kvankam ne ekskluzive) je unu-du el la arabaj landoj. Parto de nia celo estu krei en tiuj landoj arabajn esperantistojn kapablajn siavice disvastigi la lingvon en pliaj arabaj landoj;

3) Jordanujo kiel facile alirebla lando kun favoraj kondiĉoj estu unu el tiuj landoj;

4) Komencaj paŝoj estu:

a) pretigo de taŭgaj arablingvaj inform-materialoj;

b) organizado de kurso en Jordanujo per utiligo de lokaj fortoj kaj internacia helpo;

c) komunikado kun universitatuloj en la koncernaj landoj cele al organizado de komunik-reto kaj eventuale de kunveno de fakuloj pri lingvaj kaj kulturaj problemoj kun internacia partopreno por interalie informi la fakulojn pri la valoro de Esperanto kiel universitata stud-objekto;

ĉ) konversacioj inter la araba komisiono de UEA kaj israelaj esperantistoj pri la manieroj laŭ kiuj ili povas helpi en tiu ĉi iniciato.

Amano, la 24-an de julio 2000

## PROGRAMŜANĜOJ

KONGRESA TEMO 2 (Wandel) ŝoviĝas unu horon pli poste kaj okazos la 27-an de la 14h30 ĝis 15h30 h en la salono Hodler.

LA POTO: Pro la limigita kvanto da spektantoj necesas akiri (senpagajn!) biletojn por la teatraĵo "La poto", kiu okazos: vendredon je la 20h00 en la salono Zamenhof kaj dimanĉon je la 16h00 en la salono Cvetkova (domo Ŝalom Alejĥem). La biletojn oni povas ricevi ĉe la Informejo.
La busoj al la domo Ŝalom Alejĥem ekiras de la Kongresejo je la 15h00 .

## AKCEPTO POR LA MEMBROJ DE SOCIETO ZAMENHOF

okazos duonhoron pli poste, je la 19h00 (vendrede) en salono Olswanger.

## ESPERANTLINGVA VERKISTA ASOCIO

Jarkunveno de EVA okazos dimanĉon, la 30-an de julio, salono Dratwer, inter 14h45 kaj 15h30.

Ni prezentas al vi la staton de la EVA-enketo - julio 2000

KIUJ ESTAS LA PLEJ INDAJ VERKOJ EL LA ESPERANTO-LITERATURO?

Loko 1
1. Raymond Schwartz: Kiel akvo de l' rivero. - 11 voĉoj
2. Spomenka Ŝtimec: Ombro sur interna pejzaĝo - 11 voĉoj

Loko 2
K. Kalocsay: Streĉita kordo - 7 voĉoj

Loko 3
Francis: La granda kaldrono - 6 voĉoj
Rossetti: Kredu min, sinjorino - 6 voĉoj
Szathmari: Vojaĝo al Kazohinio - 6 voĉoj

Loko 4
5 voĉoj
Auld: La infana raso
Abel Montagut: La poemo de Utnoa
Spomenka Ŝtimec: Kroata milita noktlibro
Eli Urbanova: Hetajro dancas
Vladimir Varankin: Metropoliteno

La enketo daŭras. Se vi deziras voĉdoni, bonvolu lasi vian mesaĝon ĉe la Zagreba giĉeto (por EVA), ekde ĵaŭdo.



ESTAS

MALPERMESITE

FUMI EN LA KONGRESEJO

## Israelo -ata/-ita; vojaĝo tratempa

Vi sciis ke vi venos al lando de antikvo, de malnovo kiun moderno apudas kaj kunas. Tamen, necesas la ekstertempaj gestoj de preĝantoj Jerusalemaj, de nargile-fumantoj, de bazaraj marĉandantoj kaj eĉ bilet-vendantaj busŝoforoj por konfirme konsciigi al vi la antaŭscion. Ĉi-lande la historio, tiu kiun majusklo, enestas ne nur la memoron, sed ankaŭ la ĉiutagon. Konversacioj malofte limiĝas al vetero kaj cetero; eĉ turisto kelktaga sentas ke Israelo havas kelkajn dimensiojn pliajn ol tiuj de buntaj poŝtkartoj.

Kiom da Israelo kapteblas per la sensoj? Brula suno kaj onda maro sur via haŭto, spicoj de melongena salato kaj dolĉo baklava sur via lango; la nazo signalas neglektitajn rubosakojn ĉe trotuaroj, sed pli ofte tikliĝas de logaj parfumoj virinaj; viajn orelojn vundas grincaj balgo-busoj kaj gorĝaj konsonantoj... Dume viaj okuloj — ili finfine ricevas por tuta jaro porcion da ĉielbluo, sunflavo, marŝaŭm-blanko kaj da pala oro de domoj en Jerusalemo...

Kaj kion ricevas la cerbo? Tio ĉi forte dependas de vi mem. La gazetoj rakontos al vi, horon post horo, kion deciduloj fore transmaraj volas (ke la alia volu) fari pri kelkaj ĉi-lokaj megatunoj da malnova ŝtono — ŝtono tiom pli ol nura ŝtono. Libroj rakontos al vi, jarmilon post jarmilo, kion tiuj ŝtonoj estas vidintaj. Homoj rakontos al vi, jaron post jaro, kiaj travivoj ilin ligas al tiu ĉi terpeco, ankoraŭ tiom fremde fora por la plejmulto el iliaj geavoj.

Spirite sata de ĉio sensita kaj sentita, vi revenas al la kongresejo. Kaj tie, post via tempovojaĝo tra unika lando, vi retrovas vian intiman spackapsulon, en kiu via verda familio vojaĝas ekstertempe, UK-post-UK-e, serĉe al planedo sur kiu alteriĝi.

Istvan Ertl

## SUKCESOJ DE INFORMADO

• La 15-an de julio Doron Modan parolis kelkminute pri la UK en la plej aŭskultata radio-kanalo, en nokta magazino.
• Sciigoj pri la kongresa inaŭguro kaj pri la nova granda vortaro Esperanto-hebrea de Josef Murĵan aperis en tri diversaj gazetoj.
• 50 minutoj da malstreĉa konversacio kun Josef Ŝemer pri diversaj aspektoj de Esperanto, muzike ilustrata, estis/estos dufoje aŭdebla en la israela radio (Ondo A), la 22-an de julio kaj la 29-an, sabate, je 20h00.
• La 25-an, en matena radio-programo de Kanalo 2 partoprenis Tali Wandel, 16-jara denaska esperantistino, kaj lingvisto d-ro Podolsky. Al la abrupta demando "Kial Esperanto mortis?" Podolsky respondis: "Ĝi ne mortis; ĝi estis murdita de Hitler kaj Stalin."
• La alia filino Wandel, Maja, aperis la 25-an de julio en tre spektata televid-programo "La nova mateno". Pro la mallongeco de ŝia apero la programisto pardonpetis: "pro Camp David".
• La 26-an de julio la patro Wandel, Amri, anoncis en radio pri la UK en 20 sekundoj "oraj" ĉirkaŭ la 7h00, kiam milionoj aŭskultas novaĵojn dum matenmanĝo, duŝado aŭ stagnado en trafikŝtopiĝo.
• La 28-an de julio, la ruslingva programo "Kalejdoskop" de la 1-a (nacia) kanalo televida elsendos je 15h00 intervjuon, proze kaj kante, kun nia multflanka artisto ruslanda Moissej Bronŝtejn kaj kun la armena esperantistino Knarik Davtjan.
• La 31-an de julio aperos en la kongresejo skipo de la sama nacia kanalo, por prepari 10-minutan raportaĵon por la programo "Monda rigardo", elsendotan vendrede, la 3-an de aŭgusto, je 21h00.
• Ĵurnalistoj de la junulara eldono de la gazeto "Ma'ariv" vizitos la okazejon de la Infana Kongreseto vendrede, la 28-an de julio.
• Radio-kanalo de klasika muziko elsendos la 3-an de aŭgusto intervjuon kun Doron Modan.

## CSEH-KURSO kaj CSEH-SEMINARIO estas aranĝoj aparte pagendaj!!

La enskribiĝoj al la Seminario estos akceptataj ĉe la enirejo al la salono OLSWANGER merkrede kaj al la Cseh-Kurso ĵaŭde ĉe la salono DRATWER. Tiam bv pagi ĉe la enirpordo al la salono.

La aliĝintoj nepre havu ĉe si ĉiutage la kvitancon por rajti eniri la salonon!

Se estas interesitoj por observi la funkciadon de la metodo, tiuj rajtas ĉeesti, sed la organizantoj petas al tiuj resti en la salono de la komenco ĝis la fino de la leciono. Por tia observado oni devas pagi NIS 40,00 por unu leciono kaj tion oni povas fari ĉe la enirpordo de la salono de la Cseh-aranĝoj.

## ANONCETOJ

...

En la kongresa Libroservo eblas aĉeti bildkartojn pri Israelo kun esperantlingva teksto kaj poŝtmarkojn.

...

Bonvolu ne forgesi aboni "Litovan stelon" por la jaro 2001 ĉe ties giĉeto kaj viziti kunvenon de la legantoj lunde je la 17h15 en la salono Olswanger.

La Redakcio

...

Perditaj aĵoj - se troviĝis - haveblas en la Informejo.

...

Se iu hazarde prenis en la redaktejo de la kuriero la libron "La serĉado de la perfekta lingvo" de Umberto Eco, ni petas redoni ĝin, ĉar ĝi estas donaco de ĉarma filino al sia patrino. Dankon!

## SURLOKAJ ALIĜOJ

1190 mybo-x s-ro Myron Bondelid, 3143 Goldenspur Drive, Camaillo, CA 90310, Usono
1191 hhrn-z s-ro Horst H. Benemann, Kurt-Schumacher-Str. 4, 63263 Neu-Isenburg, Germanio
1192 s-ino Renata Kedzior, 2956 Sable Ridge Dr., Ottawa, Kanado
1193 s-ino Amanda Lee, 2956 Sable Ridge Dr., Ottawa, Kanado
1194 s-ino Maria J. Meirelej de Aquino, Rua Tiradentes, 360/304, 36015-360 Juiz de Fora, Brazilo
1195 s-ro David Herx, Auf dem Haeselberg 16, 54516 Wittlich, Germanio
1196 s-ino Nora Woelk, Kastanienallee 1, 14471 Potsdam, Germanio
1197 s-ino Anabella Jungvert, Bicsado, Rumanio
1198 s-ro Csaba Kerkes, Biscado 4038, Rumanio
1199 s-ino Krisztina Bartos, Biscado, Rumanio
1200 s-ino Zsuzsa Szocs, Biscado, Rumanio
1201 s-ro Valentin Melborg, Nordurbraut 33, IS-220 Hafnarfjorour, Islando
1202 s-ino Bruna Dittmann, Bleichstr. 71, 63065 Offenbach, Germanio

## ADRESŜANĜO

532. Mirreile Grosjean ekde la 9-a de aŭgusto havos novan adreson:
Grand-rue 9, pf 9, CH-2416 Les Grenets

## KVIZO

Ĉu vi volas esti kandidato por la kvizo "Kiu estos la ĉampiono de la kleruloj?", kiu okazos dimanĉon je 16h30 en salono Lapenna? Ni serĉas multesciulojn, kiuj konkuros kadre de tiu kvizo. Sentimuloj anoncu sin ĉe la Informejo, plej laste vendrede je la 12h00.

## PROSPEKTOJ PRI ZAGREBO 2001

Aperis du belaj prospektoj pri la kongresa urbo 2001. Se vi ne trovis ilin en via kongresa dokumentujo, bonvolu preni ilin ĉe la zagreba giĉeto ekde ĵaŭdo.

# STEL-AVIVO senpaŭze

KURIERO DE LA 85-a UK • Numero 3 • 27-an de julio 2000


## Mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko

Kun plezuro mi transdonas korajn salutojn al la partoprenantoj kaj organizantoj de la 85-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Tel-Avivo sub la temo "Lingvo kaj Kulturo de Paco". Efektive, Esperanto estas lingvo de paco, kreita por forĝi kompreniĝon inter ĉiuj homoj.

Estas ege konvene diskuti pri "Lingvo kaj Kulturo de Paco" en la jaro 2000, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj Internacia Jaro por la Kulturo de Paco. Unesko vidas lingvon kiel vere la ĉefan rimedon de dialogo, kaj dialogo akcelas interkompreniĝon. Lernado de lingvoj, de lingvoj de aliaj popoloj kaj aliaj kulturoj, estas valora kontribuo al "la laboro por antaŭenigi reciprokan konon kaj interkomprenon de popoloj", kiel difinas la bazajn celojn de Unesko ĝia konstitucio. Lingvolernado malfermas la pordojn de komunikado kun aliaj kaj prezentas ŝancojn krei novajn ligojn de interkompreno kaj amikeco. Jen ankaŭ la kialo, pro kiu lastatempa rezolucio de la Interparlamenta Unio alvokas la ŝtatojn kuraĝigi siajn civitanojn lerni lingvojn. Lingvoj, kiel iloj por pacaj rilatoj inter la nacioj de la mondo, estas instrumentoj de kulturo de paco nun, kiam tutmondiĝo mallongigas distancojn kaj pliefikigas komunikilojn.

Estas evidente, ke por praktike realigi kulturon de paco, bazitan sur respekto al la vivo kaj digno de ĉiu homo, sur senperforto, sur kultura diverseco kaj sur dialogo sen fanatikismo, lingvo estas unu el la plej taŭgaj iloj. La fakto ke la lingvo de tiu ĉi internacia kongreso estas Esperanto, atestas pri la bona volo de ĉiuj partoprenantoj el tiom da landoj kaj pri la forto de la Esperanto-movado, kiu ĉiam aktivis por starigi kontaktojn inter diversaj popoloj, kontribuante al internaciaj kompreniĝo kaj paco per forigo de lingvaj baroj.

Ni gratulas Universalan Esperanto-Asocion pro tiu ĉi iniciato kaj, esperante ke la dialogo disvolvita ĉi tie helpos akceli la pacprocezon kaj amikajn rilatojn en tiu ĉi regiono, mi deziras al la Kongreso plenan sukceson.

Koichiro Matsuura

## INTERNACIA ARTA VESPERO

Artistoj, kantistoj, deklamistoj, kaj ĉiuj kiuj ŝatus prezenti dum la Internacia arta vespero, bonvolu kontakti Elena Puĥova kaj/aŭ Mojssej Bronŝtejn en la oficejo de LKK hodiaŭ (ĵaŭdon) ek de la 10h00 ĝis la 13h00. Bonvolu konsideri, ke ne necesas profesia nivelo, sed tamen sufiĉe alta kvalito.

## NULIGO DE TRANSPORTO "AL" KAJ "DE" LA KONGRESEJO

Pro teknikaj problemoj la semajna transporto de la hoteloj al la Kongresejo, kaj reen, devis esti NULIGITA.
Ĉiuj, kiuj mendis la bileton por tiu servo ricevos la monon.

## Mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj

Estas por mi granda plezuro transdoni miajn plej varmajn bondezirojn al la 85a Universala Kongreso de Esperanto.

La komenco de nova jarmilo donas al ni unikan okazon por pripensi nian komunan destinon, en momento kiam ni estas interkonektitaj kiel neniam antaŭe. La avantaĝoj de tutmondiĝo estas evidentaj: pli rapida ekonomia kresko, pli altaj vivniveloj, novaj ebloj. Tamen komenciĝis reago, ĉar la distribuo de tiuj avantaĝoj ne estas tre egala kaj ĉar la tutmondan merkaton ankoraŭ ne ankras reguloj sur bazo de komunaj sociaj celoj.

La aparta rolo de Unuiĝintaj Nacioj en la nova tutmonda erao deriviĝas el la universaleco de nia membraro kaj niaj agadoj kaj el la komunaj valoroj kiujn esprimas nia Ĉarto. Estas nia tasko certigi, ke tutmondiĝo donu avantaĝojn ne nur al iuj sed al ĉiuj, ke paco kaj sekureco realiĝu ne nur por kelkaj, sed por multaj; ke ebloj ekzistu ne nur por privilegiuloj sed por ĉiu homo ĉie. Pli ol iam ajn Unuiĝintaj Nacioj estas bezonataj por transponti diferencojn inter ŝtatoj rilate al potenco, kulturo, grandeco kaj interesoj – servante kiel la loko kie oni esprimas kaj antaŭenigas la aferon de komuna homeco.

Dum via kunesto en Telavivo, memoru ke ĉiu el ni povas fari ion por ke nia unueca mondo estu pli bona mondo, kaj ke ĉiu el ni havas devon eluzi ĉiujn siajn eblojn. Unuiĝintaj Nacioj povas krei eblojn, sed ĝi ne povas devigi vin uzi ilin. Ĝi povas gardi pacon, sed gi ne povas devigi vin alproprigi ĝin. Ĝi povas helpi por identigi vojon al evoluado, sed ĝi ne povas sola laŭiri tiun vojon. Al vi, la popoloj de la Unuiĝintaj Nacioj, apartenas la tasko "kapti la tagon" kaj plej multe eluzi, por la bono de plej multaj homoj, la eblojn kiujn prezentas tiu ĉi nova epoko. En tiu spirito, mi deziras al vi plenan sukceson.

(La lasta frazo estis en Esperanto la ceteraj estas tradukitaj de la angla).

La preciza titolo de la IKU-prelego de U. Lins en lundo (10h15 - 11h15) estas:

'IZRAEL LEJZEROWICZ - RADIKALA ESPERANTISTO"

## Mesaĝo de d-ro L. C. Zaleski-Zamenhof

Sinjoro Prezidanto, Sinjoro Vicurbestro de la gastema urbo Tel-Avivo, Gesinjoroj Honoraj Gastoj, Gesinjoroj Lokaj Komitatanoj,

Saluton al vi, estimataj gesinjoroj, saluton al vi, geamikoj, venintaj de tre diversaj proksimaj kaj malproksimaj lokoj sur nia terglobo, por kongresi, ĉe la sojlo de miljaroj, en la patrolando de popolo, ene de kiu la Iniciatinto de nia lingvo serĉis iam siajn antikvajn originojn.

Vi venis kongresi al la patrolando de Abrahamo, de Jakobo, de Moseo kaj de Kristo, sed ankaŭ patrolando de Hillelo, teologo vivinta tie antaŭ ĝuste du miljaroj, filozofo kies ideoj inspiris iamaniere la Zamenhofajn.

Vi venis al la sankta lando de tri grandaj religioj, lando de Dio, "kiun ĉiuj malsame prezentas, sed ĉiuj egale en koro (Lin) sentas".

Vi alvenis tien en la Jaro de Kulturo de Paco, do, laŭ la difino de Unesko, jaro de la kompreno, de la toleremo kaj de la solidareco inter la popoloj kaj inter iliaj kulturoj. Kulturo de Paco, signifanta kulturon de valoroj, de kondutoj, gvidantaj senperforte al universala justeco garantionta al ĉiu ajn la vivantan realecon de homaj rajtoj. Kulturo de Paco, kontraŭstarante la minacon de pereo de la diverseco de nia spirita heredaĵo, kies postlason ni ŝuldas al la estontaj generacioj.

Vi venis por debati la rolon de la LINGVO ene de tiu KULTURO de PACO, debati la rolon de la LINGVO kiel vehiklo de la kultura diverseco, diverseco prezentanta substancan faktoron de la spirita riĉeco de la homaro. Vi venis por debati la rolon de la LINGVO NEŬTRALA, lingvo ne ambicianta anstataŭi iun ajn lingvon nacian, ŝirmon de nacia kulturo, tamen, en ĝia rolo de LINGVO INTERNACIA, kontribuanta al la kompreno kaj, pere de kompreno, al la toleremo de kulturo de la najbaro, LINGVO servanta tiamaniere la ĉefajn faktorojn de la KULTURO de PACO.

Ĉar nia lingvo neŭtrala portas en si implicite la Zamenhofan idealon de toleremo kaj de la amikeco, de la frateco interhoma. La vortoj de lia "Preĝo sub la Verda Standardo": ... kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj, / antaŭen kun pacaj armiloj!/ kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj, / ni ĉiuj de Di' estas filoj ... sonas tie ĉi ankoraŭ pli forte.

En la nomo de la familianoj Zamenhof mi deziras al la 85-a Universala Kongreso de Esperanto plenan sukceson kaj fortan eĥon tra la mondo, hodiaŭ, same kiel hieraŭ, kulturon de paco soifanta.

## Emfazoj de la malferma parolado de Kep Enderby, prezidanto de UEA

Mi volas sugesti ke, kaj simbole kaj loke, tiu ĉi Tel-Aviva kongreso estas elstara evento, kaj por UEA kaj por Esperanto ĝenerale. Ĝi ne nur daŭrigas la politikon de UEA kongresi en tiom da landoj tra la mondo kiom eblas, kaj farante tion, elmontri la uzon de Esperanto kiel utila helpilo en la praktikaj aferoj de la nuntempa mondo, sed ankaŭ, almenaŭ simbole, identigi Esperanton kun ĉiuj aliaj personoj de bonvolo kiuj strebas havigi pacon tra la mondo.

Por iuj el ili aparte, tiu kongreso estas emocia kaj grava evento ĉar la inicianto de Esperanto, d-ro Zamenhof estis judo kaj fieris pri sia judeco.
Tute aldone al tia emocia ligo de d-ro Zamenhof al la kongreso, elstara ekzemplo de la laboroj de UEA estis la seminario kiu okazis antaŭ kelkaj tagoj en Amano, Jordanio, kun la temo "Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj".

Sekvas de tio ke la fundamenta pravigo de niaj klopodoj, eĉ pli grava ol la disvastigo de Esperanto mem, estas la celo helpi plipacigi rilatojn inter diversaj popoloj de la mondo. Mi ne konsideras herezaĵo diri ke la disvastigo de Esperanto mem estas nur grava ilo por tion fari.

Multaj supraĵaj pensantuloj opiniemas ke lingvo estas nur komunikilo inter homoj. Lingvo sendube estas tia, sed ĝi ankaŭ estas multe pli ol tio. Aliaj akceptas ke lingvo estas pli ol nur komunikilo kaj opinias ke por plenigi la signifon, sufiĉas aldoni ke ĝi ankaŭ estas identigilo de malsametnaj aŭ malsamnaciaj popoloj. Mi volas sugesti ke tiuj lastaj opinioj ankaŭ subtaksas la tutan veran rolon de lingvo.

Mi devas diri ke mi opinias ke niaj kritikantoj ofte pravas: ke unu el la kialoj por nia manko da sukceso estas la fakto ke ni agas kvazaŭ ni kredas ke regon de Esperanto sole sufiĉas por solvi la problemojn de la mondo. Niaj tiaj plendoj ĝenerale falas sur surdajn orelojn. Aspektante kiel utopiemaj idealistoj, pacamantoj al kiuj mankas praktikaj rimedoj nepre ne sufiĉas. Mi scias ke tio ne estas vero sed tio ja estas la apero kion ni prezentas tro ofte al nia ĉirkaŭanta neesperanta mondo. Kiel komunumo kiu ankaŭ estas movado, iel, ni devas salti kvalite el nia nuntempa situacio por atingi novan etapon en nia evluo,

## Saluto de Amri Wandel, prezidanto de LKK

Estimataj gastoj, karaj geamikoj,

En 1967 devus okazi UK en Tel Avivo. Pro la tiama milito tiu kongreso ne okazis. Unu salono de nia kongresejo portas la nomon de la prezianto de ĝia LKK, mag. Isai Dratwer. Tridek tri jaroj pasis ĝis UEA kaj la Israela E-movado aŭdacis reprovi organizi UKn en Israelo. Tio estis kuraĝa decido de UEA pro la risko, sed necesa por montri ke UEA estas vere tutmonda. Ĉi foje la kongreso okazas, ne en la ombro de milito sed kun la espero de pacnegocoj. Ĝi estis kuraĝa decido ankaŭ por la Israela movado, kiu laŭ iuj ne estas sufiĉe forta por okazigi UKn. Tamen, iu ĉi kongreso ne povus okazi sen la entusiazmo kaj la sindonema laboro de malgrada teamo de la LKK. Nome de la LKK mi kore bonvenigas vin al la 85a kongreso de Esperanto en la urbo Tel Aviv. Ĝuu la kongreson, la urbon kaj la landon!

### TEATREMULOJ KAJ SABATAJ EKSKURSANTOJ - ATENTON!

Averto pri publika transporto vendrede vespere kaj sabate matene: bonvolu noti, ke vendrede ekde la 16h00 kaj sabate ĝis la 18h00 ne funkcias la publikaj busoj en Israelo. La sola publika transportilo kiu funkcias estas specialaj taksioj, troveblaj ankaŭ apud la kongresejo. Konsideru tion koncerne la vendredan teatraĵojn kaj la alvenon antaŭ la 8h00 por la tuttagaj ekskursoj.

BECAVTA - ISRAELA KLERIGA PROGRAMO. Elisabeth Schwarzer serĉas aliajn kongresanojn kiuj bone konas la klerigan programon "Becavta". Mi volonte interŝanĝos spertojn kaj kunlaboros. (k.n. 647)

## KUNVENO PRI LA KULTURPOLITIKO DE UEA

Ĉeesias 30 homoj, gviias Michela Lipari.

Post prezento de la kultura agado de UEA (eldonado, Belartaj konkursoj, Serio Oriento-Okcidento), kaj de festivaloj kiel KAFE en Francio, aŭ KEF en Skandio, sekvis diskuto ĉu UEA devas aŭ povas havi kulturpolitikon; kiel ĝi povas influi - ĉar Unesko mem ŝanĝis sian ideon pri kulturo. Ni eventuale dediĉu Universalan Kongreson al nia propra kulturo, esperante la esperantistojn. Ni ankaŭ instigu la esperantistojn sendi librojn al malpli favorigitaj kluboj tra la mondo. UEA subtenu la iniciatojn (vidbendoj pri teatraĵoj, kompilado de tradukaĵoj, ktp). Ĉar sola estrarano ne povas ĉion fari, kunlaborantoj estas bonvenaj.

(k.n. 482)

## Ĉu Vin interesas Astronomio?

La Astronomia Esperanto-klubo (AEK), kiu aĝas nur 6 monatojn, jam kunigas 40 membrojn en 16 landoj.

Dum la UK ni kunvenos ĉe la sekvaj programeroj:

Ĵaŭde, 12h45 (Maschler) IAdEM

Vendrede, 14h00 (Lapenna) Prelego de Prof. Amri Wandel (enkadre de Kongresa Universitato)

Vendrede, 15h00 (Olswanger) ISAE

Lunde, 14h00 (Maschler) Fondkunveno de la AEK!

Kaj ekster la kongresejo - vizito al Astronomia Observatorio, noktoĉiela observado.

PETU NIAN ĴUS APERINTAN "Astronomian Almanakon 2000"

# PROGRAMŜANĜOJ

**KONGRESA TEMO 2** (Wandel) ŝoviĝas unu horon pli poste kaj okazos la 27-an de la 14h30 ĝis 15h30 h en la salono Hodler.

**LA POTO:** Pro la limigita kvanto da spektantoj necesas akiri (senpagajn!) biletojn por la teatraĵo "La poto", kiu okazos: vendredon je la 20h00 en la salono Zamenhof kaj dimanĉon je la 16h00 en la salono Cvetkova (domo Ŝalom Alejĥem). La biletojn oni povas ricevi ĉe la Informejo.
La busoj al la domo Ŝalom Alejĥem ekiras de la Kongresejo je la 15h00 .

La Komitato de UEA traktos la agadraporton de UEA pri la jaro 1999 en sia kunsido morgaŭ matene (ĵaŭde) ekde la 9h00 en salono Hodler. En tiu kunsido estas bonvenaj ĉiuj interesitaj kongresanoj. Ili rajtos paroli kaj starigi demandojn pri la raporto.

## Aŭtoraj duonhoroj en la Libroservo.

Je 11h00 Agneta Emanuelsson kaj Istvan Ertl prezentos du librojn, aperintan kaj aperontan, pri Valdemar Langlet, holokaŭsta heroo esperantista.

Je 16h00 renkontu la poeton Mikaelo Giŝpling.

ATENTU PARTOPRENANTOJ DELA PRELEGO "HEBREA EKSPRESE": Tiuj kiuj ĉeestis la unuan lecionon merkredon, venu al la dua (kaj lasta) parto nur dimanĉon inter 15h45 kaj 16h15 (salono Dratwer) Por tiuj kiuj ankoraŭ ne ĉeestis la unuan lecionon la sesioj okazos en la jenaj datoj: ĵaŭdon inter 15h45 kaj 16h45 kaj dimanĉon inter 16h15 kaj 16h45.

# STEL-AVIVO
## senpaŭze

KURIERO DE LA 85-a UK • Numero 4 • 28-an de julio 2000

## KONGRESA TEMO KIA KULTURO? KIA PACO? KIA LINGVO? (Humphrey Tonkin)

En tiu ĉi unua prezento de la kongresa temo, Humphrey Tonkin levis kelkajn demandojn por konsidero de la ĉeestantoj. Ni ilin prezentas al la kongresanaro ĝenerale, kun instigo ke oni partoprenu la ceterajn kunsidojn pri la kongresa temo.

1. Ĉu Esperanto estas aŭtentike alia ol aliaj lingvoj? Ĉu ĝi vere povas roli kiel lingvo de la paco?
2. Se jes, ĉu ni devas ŝanĝi la metodojn, kiujn ni uzas por utiligi kaj disvastigi Esperanton?
3. Kiujn konkretajn paŝojn ni povas fari por plifortigi la rolon de Esperanto kiel lingvo de la paco?
4. Kiun rolon ni povas ludi kiel privataj civitanoj en la lukto por pli justa mondo kaj la kreo de kulturo de paco?
5. Kiel mastrumi mondon de multaj kulturoj kaj multaj lingvoj?

## ESTRARO RESPONDAS

Viglis, kiel kutime, la neformala renkontiĝo de la Estraro kun la membraro de UEA. La pridemandado tuŝis plurajn temojn ekde la malfacilaĵoj por blinduloj partopreni UK-oj al la rolo de estrarano pri kulturo. Apartan atenton oni dediĉis al la utiligo de Interreto en la nuna interna kaj ekstera informado kaj kiom UEA ekspluatas ties eblecojn. Kiel kutime, la publiko prezentis ankaŭ plendojn ligitajn al la nuna kongreso, kun aparta atento al la problemoj ĉe junulargastejoj, al la maltaŭgeco de la kongresejo ktp. La ĉeestantaro starigis poste demandojn pri la estontaj UK-oj: kiel oni elektas landon, urbon, ejon. Kaj fine oni tuŝis politikajn temojn kiel la neŭtralecon de UEA kaj la alvenintajn dum la jaro plendojn rilate la nunan UK-on.

## TRANSPORTO POR REVENFLUGOJ

Kongresanoj kiuj mendis transporton al la flughaveno bonvolu NEPRE viziti la giĉeton Loĝiga servo aŭ/kaj Ekskursoj por informi pri la detaloj: dato, dato de reflugo, horo, flugmaniero, hotelo de kie oni ekas, horo de la starto de la hotelo. Sen tio ne eblas organizi la transporton kaj LKK ne respondecas pri eventuale neuzota servo. Se vi ne loĝas en iu el la kongresaj hoteloj aranĝitaj pere de UEA (Dan Panorama, Metropolitan, Tal, Top, Moss, Adiv, Sun Bat Jam) vi devas informi kie kolekti vin por la transporto.

## KONFIRMADO DE FLUGOJ

Ĉiuj kongresanoj kiuj venis fluge devas MEM rekonfirmi siajn reflugojn almenaŭ 72 horojn antaŭ la foriro ĉe siaj respektivaj flugkompanioj. Ĉiuj akceptejoj de la hoteloj devas laŭleĝe fari tion por ĉiuj klientoj. Se estas iuj ajn ŝanĝoj de la reflugaj detaloj bonvolu nepre informi la ekskursan giĉeton (Esti Saban) pri tio.

## LA RENDEVUA TABULO TROVIĜAS KONTRAŬFLANKE DE LA SALONO ZAMENHOF EN LA VESTIBLO. ATENDAS VIN MULTAJ LETEROJ.

## REZULTOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2000

### POEZIO:

1-a premio: Mikaelo Giŝpling (Israelo) pro "Neĝa fantazio";
2-a kaj 3-a premioj: ne aljuĝitaj.
Honoraj mencioj: Stefan MacGill (Hungario) pro "Letere etere", kaj Nikola Raŝiĉ (Nederlando) pro "Telefonvoko al postmoderno".
Partoprenis 40 poemoj de 17 aŭtoroj el 12 landoj.

### PROZO:

1-a premio: Julia Sigmond (Rumanio) pro "Mi ne estas Mona Lisa";
2-a kaj 3-a premioj: ne aljuĝitaj.
Honoraj mencioj: Claude Schroeder (Francio) pro "Amletero" kaj Tibor Kristaly (Hungario) pro "Leon-vilaĝo".
Partoprenis 11 verkoj de 8 aŭtoroj el 8 landoj.

### TEATRAĴOJ:

Neniu premio aljuĝita. Partoprenis 1 verko de 1 aŭtoro.

### ESEO:

Premio "Luigi Minnaja": Sten Johansson (Svedio) pro "Kiel legi - ĉu legi - Stellan Engholm?";
2-a premio: Nikola Raŝiĉ (Nederlando) pro "Digrafio: speciala kazo de rilato inter lingvo kaj skribo";
3-a premio: Sten Johansson pro "Belartaj Konkursoj de UEA 1950-1999";
Honora mencio: Carmel Mallia (Malto) pro "La vojo".
Partoprenis 4 eseoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

### KANTO

PREMIO "Ahn Song-san pri Kanto": Tarcisio Lima (Brazilo) pro "Diskanto" kaj "Ĉi-paĝa dezir'";
2-a premio: Anja Karkiainen kaj Vesa Polkki (Finnlando; resp. teksto kaj muziko) pro "La koroj batu";
3-a premio: ne aljuĝita.
Partoprenis 6 kantoj de 4 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 3 landoj.

### INFANLIBRO:

Premio "Infanlibro de la Jaro 1999": "La avo en la ĉareto" de Gudrun Pausewang, tradukita el la germana kaj eldonita de Nora Caragea (Germanio).
Partoprenis 5 libroj de 5 eldonejoj el 5 landoj.

### VIDBENDO

(La konkursaĵoj prijuĝotaj dum la UK; la rezulto anoncota en la Fermo.)

En la ESPERANTOLOGIA KONFERENCO (dimanĉon inter la 14h45 kaj 18h00, salono Hodler) aŭdeblos jenaj prelegoj
Geraldo Mattos: EN LA KOMENCO ESTAS LA VORTO (KIEL FARI VORTOJN).
Christer Kiselman: PRISKRIBO KAJ NORMIGO DE MATEMATIKAJ TERMINOJ

CSEH-KURSO kaj CSEH-SEMINARIO: Cseh aranĝoj fariĝis tradiciaj dum UK-oj. Ili ĉiam reaktualigas ĉi tiun tipe Esperantan instrumetodon, pliriĉigitan per la videokursa materialo Mazi en Gondolando. En la seminario oni studos kiel uzi la Mazi-materialon pli efike. La seminario estas destinita al instruistoj, kiuj deziras lerni la metodon aŭ akiri ateston pri ĝi. La seminarianoj devas havi la libron "Baza Cseh-kurso" (10,90 eŭroj ĉe la Libroservo de UEA) kaj ankaŭ observi la kurson. La kurson kaj la seminarion gvidos Atilio Orellana Rojas de IEI en Hago. La partopreno en ambaŭ aranĝoj estas aparte pagenda. La kotizo por la kurso estas 65 guldenoj kaj por la seminario 90 guldenoj por loĝantoj de A-kategorio; por loĝantoj en landoj de B-kategirio la kotizoj estas 20 kaj 40 guldenoj respektive. La kotizo por la seminario inkluzivas la observadon al la kurso.

## HELPU AL HELPFLEGISTO

Naskiĝinte en togolanda vilaĝo en 1958, s-ro Kossi Logossou, esperantisto ekde 1986, havis multe da vivmalfacilaĵoj: morto de la gepatroj kaj fratoj, longtempa malsaniĝo, soleco, ktp. Feliĉe la Providenco helpis, ke li nun, dank' al katolikaj fratinoj de la vilaĝo, estas helpflegisto. Li tiel havas iom da mono por vivteni sin. Sed lia situacio estas nun pli malbona, ĉar multajn parencojn li prizorgas. Li ne povas ne fari tion, sed ankaŭ devas pensi pri sia estonteco. Plia lernado por fariĝi flegisto estas por li la sola solvo. Nun kiel li povas atingi tiun celon? Helpo de esperantistoj estas bezonata. Helpemuloj kontaktu s-ron Gbeglo Koffi, estrarano de UEA pri la Agado en Afriko.

## ILI ESTIS ĈI TIE

Laŭ longtempa tradicio, en UK-oj ni ĉiam volonte spektas Naciajn Vesperojn, kiuj povas rakonti multon pri la gastiga lando. Tamen, la karakteron de Israelo pli konvene spegulas... Internacia Vespero. Ĉar tiu nomo ja pli taŭgus por la spektaklo de la folklora trupo Anaĥnu Kan ("Ni estas ĉi tie"), kies dancoj kaj kantoj radikas jen en Hispanio, jen en Rusio kaj Litovio - kio ne mirindas en lando kun loĝantoj enmigrintaj el ĉiuj mondregionoj, kiuj kunportis siajn tradiciojn kaj kutimojn en la malnovnovan patrujon. La lertmovaj junaj dancistoj kaj beltembraj korusanoj de Anaĥnu Kan katenis la atenton de saloneg-pleno da kongresanoj, same kiel ĝiaj du solo-kantistoj. Alternis melodioj tutmonde konataj kun muzikeroj judaj kaj jidaj; ni estis eĉ komplezitaj, pli ol unu fojon, per Esperantlingva kantado. Videble ne sufiĉis du horoj da movoj kaj melodioj: la entuziasma spektintaro nur hezite disiris post unu sola biso.

## AFRIKO EN ISRAELO

La 27-an de aprilo 2000 Afriko plurfoje aperis en la salonoj de la kongresejo:

- En la salono Hodler la komitatanoj pliafoje pritraktis la raporton pri la agado en Afriko.
- En la salono Maschler okazis komitata gruplaboro. S-inoj Renee Triolle kaj Tantin Ackermann laboris kun Gbeglo Koffi. Ili povis paroli pri gravaj aferoj koncerne la movadon en Afriko.
- En la salono Olswanger okazis la unua afrika kunveno. Pli ol tridek kongresanoj aŭdis raportojn pri la movado en Afriko. Ĉeestis kvin afrikanoj: 4 el Sudafriko kaj unu el Togolando. La movado en Sudafriko, Tanzanio, Ganao, Niĝero, Kongolando, Madagaskaro, Benino, Senegalio ktp. estis priparolita. Ne mankis vortoj pri la rilatoj inter afrikanoj kaj eksterafrikanoj; la kunvenantoj ricevis la novan planon "Prioritato Afriko", pri kiu ili parolos dum la dua kunveno.

Tiu unua apero de Afriko en Israelo iel montras la homojn kiuj vere interesiĝas pri la movado en Afriko. La afrikanoj dankas ĉiujn, kaj precipe s-inojn Renee kaj Tantin kiuj sincere subtenas Afrikon.

(k. n. 95)

## INTERESAĴOJ PRI LA BELARTAJ KONKURSOJ

Dum la kunveno de Belartaj Konkursoj, dum kiu enkonduke parolis Vilmos Benczik, prezidanto de la Komisiono pri Belartaj Konkursoj, ni aŭdis, ke ĝis nun 600 verkistoj estis premiitaj. El tiuj 600 premioj, al Marjorie Boulton iris 22 premioj. La plej multajn premiojn en la 51-jara ekzisto de la Belartaj Konkursoj gajnis Britio - pli ol 100 premiojn, dum la duan lokon okupas Hungario kaj la trian Italio.

## AŬTORAJ DUONHOROJ

okazas en la Libroservo. Vendrede vi povas renkonti
je 11h00 Moissej BRONŜTEJNO kaj
je 16h00 Claude PIRON.
Venu, aŭskultu, demandu – aĉetu kaj legu!

## INFANA KONGRESETO VIGLAS, VIZITOS...

Rapide amikiĝis la 18 infanoj, eĉ kelkaj antaŭ ekiro al la kongresejo, junulara vilaĝo Hadassim, 30 km norde de Tel Aviv. Pro la multaj devenlandoj (CA, FR, DE, HR, HU, IL, JP, NO, RO) eblecoj krokodili mirinde malgrandas. Duono de la infanoj estas denaskuloj; ĉe aliaj la nivelo tre varias - kiam infana ludado postulas komunikadon, oni atingas mirigajn solvojn kaj progreson.

Post interkonigaj ludoj kaj tuttaga ekskurso al akvo-parko Ŝfaim, la infanoj pentris tolaĵojn, kiujn ili montros en la Tago de la lernejo (salono Lapenna ekde 11h40). Kiu volas konatiĝi kun ĉi tiu unika pluvivigejo de nia lingvo - venu al tiu kunsido de ILEI, kiu komenciĝos je la 9h00.

(k.n. 264)

## ĈU LA ZAGREBA KONGRESO JAM KOMENCIĜIS?

Vi certe jam povis vidi ke estas vigle ĉe giĉeto de sekvontjara UK, al kiu jam aliĝis pli ol 40 geesperantistoj. La organizantoj miras pri nombro de alikontinentaj aliĝantoj, inter kiuj la plej multaj estas brazilanoj.

Hodiaŭ la giĉeton vizitis ankaŭ reprezentantoj de la plej granda kroata turisma agentejo "Generalturist" kaj Kroata turima unuiĝo kiuj kunlaboras pri organizado de UK en Zagreb.

La zagrebanoj tre serioze komprenis kio atendas ilin kaj jam nun vi povis rimarki ilin dejori ĉe diversaj servoj de telaviva kongreso por spertiĝi.

Ĝojigas la fakto, ke la plej granda kroata gazeto "Večernji list", kiu promesis per ĉiutaga informado pri UK kontribui al sukceso de la 86-a UK jam eklaboris tiucele. Nome, ili aperigas ĉiutage informojn pri tio kio okazas en Tel Avivo. Tial ni povus diri ke la zagreba kongreso jam komenciĝis.

## POSTKONGRESAJ EKSKURSOJ (P1, P2)

Estas ege rekomendite por la partoprenantoj de la ekskursoj, ĉeesti la kunvenon pri ĝeneralaj detaloj koncerne tiujn ekskursojn: lunde, 31/7, ekskurso P1 al Jordanio - je la 10h00, kaj ekskurso P2 al Israelo - je 11h00, en la salono Olswanger.
Tiuj kiuj ne povas ĉeesti la kunvenon lunde, estas petataj kontakti - ĝis lundo - Miki (Mikaelon) aŭ Nava ĉe la giĉeto Ekskursoj, por ricevi detalojn.

GRAVE POR LA PARTOPRENANTOJ DE LA EKSKURSO AL JORDANIO

1. Bonvolu skribi viajn personajn detalojn (sur la anonctabulo) per klara manskribo (per nekunligitaj literoj) - ekzakte kiel tiuj detaloj aperas en via pasporto.
2. Bonvolu alporti al la renkontiĝo validan pasporton + vizon al Jordanio.
3. Kunportu la PRECIZAN sumon de 64 sikloj.

Via kunlaboro ŝparos al ni longan atendadon ĉe la landlimo.
Bondeziras al vi sukceson,
Nava Cinori kaj Mikaelo Karpati

(Mal)ĝojiga sciigo al GEFUMANTOJ!
Ĉar ESTAS STRIKTE MALPERMESITE FUMI en la kongresejo, EKFUNKCIIS FUM-ANGULO ĉe la kongreseja lifto-halo.
Dankon pro via komprenemo.

## ĈU VI SCIAS, KE ...

... en Belizo, Dominika Respubliko, Gvatemalo, Haitio, Honduraso, Kubo, Panamo, Peruo kaj Salvadoro estas multaj dezirantoj lerni nian lingvon, sed la manko de lernomaterialo estas granda malhelpo?

Por provizi la menciitajn landojn per taŭgaj instruiloj estas bezonataj 1.000,00 eŭroj. Vi povas helpi UEA realigi ĉi tiun projekton per donacado de almenaŭ NIS 10,00 al la fondaĵo "Ameriko". Vian kontribuon bonvolu transdoni al la UEA-kasisto aŭ ĉe la Amerika Budo.

(Atilio Orellana Rojas, k.n. 525)

Vi estas invitata al SPIRITISMA KUNVENO (Salono Olswanger), lundon, la 31-an de julio inter la 12h00 kaj 13h30. (Spiritisma Pentateŭko, Revelacio, Reenkarniĝo)

---

SANIĜO PER SPIRITAJ FORTOJ - MEDICINE PRUVEBLA!
En la prelego de Amikaro Bruno Groening la kuracistino Katja Bueker prezentis la dokumentojn de saniĝo de surdeco kaj de ostoporozo. Krome raportis pri siaj saniĝo Detlef Meier de perturboj de la manĝkutimoj, deprimoj kaj pensoj pri memmortigo, Harold Hombach de konstantaj dorsodoloroj kaj Anneke de Wal de 7-jara paralizo. Ripeto de la prelego estos en salono Maschler vendrede kaj dimanĉe je la 9h00 kaj lunde je la 16h30.

---

Mi havas la agrablan taskon refoje informi ke:
1. La Kongreso de LIBE okazos en Plovdiv, Bulgario ekde la 5-a de aŭgusto 2000,
2. La Kongreso de la fervojistoj (IFEF) okazos same en Plovdiv, Bulgario, en 2002.
La bulgaraj esperantistoj bonvenigas vin en Plovdiv
Eva Bojaĝieva

---

La Ligo de Samseksamaj Geesperantisoj (LSG) invitas ĉiujn kongresanojn al sia informkunsido en la salono Maschler, lundon je la 10h00. Tie ni diskutos la staton de gegejoj en la regiono kun lokaj gastoj, kiuj traktos la kongresan temon koncerne la vivon kaj akcepton de gegejoj en la diversaj komunumoj.

## SURLOKAJ ALIĜOJ

1203 dmbm-j s-ro M. Gal Dembo, 124 Hagalil-str., IL-326 83 Haifa, Israelo
1204 s-ro Conrad Jackisch, Ilee N. Glienicke 2, 14482 Potsdam, Germanio
1205 s-ino Helen S. Merrick, 1085 Ranchero Y # 12, San Jose, CA, Usono
1206 s-ro Tadaŝi Naruo, Tenon-kjo, Kameoka-ŝi, Kioto-ju, Japanio
1207 s-ro Michael England, Langholms 6.20, 11733 Stockholm, Svedio
1208 s-ro Estacio Sardeiro Rodriguez, Caixa Postal 5049, Brazilandia - DF, Brazilo
1209 s-ro Adair Sasconcelos, Caixa Postal 5049, Brazilandia - DF, Brazilo
1210 s-ino Shirlene V. Areda, Caixa Postal 5049, Brazilandia - DF, Brazilo
1211 s-ino Oksana Osoĉenko, Miuca-Joav 51/517, 84796 Beer-Ŝeva, Israelo
1212 s-ino Teresia Huffener, Ooststraat 47, 2547 XC Den Haag, Nederlando

# STEL-AVIVO
## senpaŭze

KURIERO DE LA 85-a UK • Numero 5 • 29-an de julio 2000

## AFRIKO (2)

Vendredon, la 28-an de julio 2000 okazis la dua afika kunveno. Dek tri gesamideanoj klopodis serĉi rimedojn por progresigi la movadon en Afriko. Temis ĉefe pri efektivigo de la plano

## PRIORITATO AFRIKO

La ĉi-sekva agad-programo de UEA havas la nomon de simila programo de UNESKO, kvankam la enhavo, en tiu ĝenerala kadro, rilatas precipe al tio, kion la Esperanto-movado povos fari en Afriko dum la venontaj jaroj. La vorto "prioritato" montras la punktojn, kiujn afrikanoj trovas prioritataj en sia agado.

1-a punkto: Esperanto: lingvo afrika - Temas pri komenca instruado de la lingvo al afrikanoj laŭ la ĝisnuna praktiko. Pli da emfazo estu donata al instruado pere de afrikaj lingvoj, al instruado fare de afrikanoj mem, al instruado de perfektigaj kursoj, al tradukado al Esperanto de literaturaj verkoj en afrikaj lingvoj, al verkado de libroj fare de afrikanoj.

2-a punkto: Esperanto: movado afrika - Temas pri klopodoj por stabiligi la movadon en landoj, kie ĝi ekzistas, doni prestiĝon al ekzistantaj Landaj Asocioj kaj fondi aliajn en landoj, en kiuj ili ne ekzistas. Ankaŭ pri la stabiliĝo de la Afrika Oficejo temas ĉi tiu punkto. La landaj movadoj komencu financi sin mem kaj gvidi la informadon ankaŭ al lando, kie nun ne estas esperantistoj.

3-a punkto: Esperanto-lernejoj - Temas pri malfermo de lernejoj en afrikaj landoj: akirado de grundo kaj konstruado sur ĝi de la lernejo. En ĉiu lando, la lernejoj funkciu kiel normala enlanda lernejo laŭ la enlandaj leĝoj, kaj Esperanto estu instruata en ili. La unua eksperimento okazos en Togolando.

4-a punkto: Helpo al afrikaj lernejanoj - Kolektado de eŭroplingvaj lernolibroj, ĉefe pri teknikaj fakoj, kaj donacado de ili al afrikaj lernejanoj.

5-a punkto: Fondaĵo Afriko - Temas pri kolektado de sufiĉe granda kapitalo, el kies rento oni povos financi la agadon en Afriko.

6-a punkto: Realigo de etaj projektoj - Temas pri trovado de helporganizoj, grupoj aŭ unuopuloj, kiuj financu projektojn de afrikaj esperantistoj. Bestobredado, agrokulturo, fiŝado, ktp.

7-a punkto: Integriĝo de Afriko en la tutmonda Esperanto-komunumo - Ne manku afrikanoj en la gvidorganoj de la internaciaj Esperanto-organizajoj, precipe TEJO kaj UEA. Estu klopodoj, ke afrikanoj povu ofici en la CO de UEA, volontuli por UEA aŭ TEJO.

La tuta agado okazos sub la respondeco de la Afrika Komisiono de UEA, kiun vi povos kontakti rete je la adresoj: Gbeglo Koffi - esp.togo@cafe.tg aŭ Hans Bakker - hbakker@groenlinks.nl.

Ĉiuj partoprenantoj faris belegajn proponojn, kiuj ege helpos en la realigo de la plano. La disponebleco de la sudafrika movado kontribui en tio estas tute granda sukceso jam. Ĉar Afriko helpas al Afriko. Afriko ŝatus esti memstara: la realigo de la projekto igos, ke la movado en Afriko, per sia funkciado daŭre, ne atendos, ke mono unue iru en la kason de la Afrika Fondaĵo. Aliaj kongresanoj kontaktu la Afrikan komisionon, proponante rimedojn.

## AŬTORAJ DUONHOROJ

Dimanĉon:
je la 11h00 Gunnar Gallmo, aŭtoro de "Mokrokalvo", interpreto de skandinavaj mitoj;
je la 16h00 Yasuo Hori, regula kunlaboranto de "Monato", aŭtoro de tri volumoj de "Raportoj el Japanio".

Lundon je la 16h00 Geraldo Mattos.

## AZIA AGADO

Okazos dufoje la kunsidoj pri azia movado:

- la UNUA kunsido okazos en la nomo de Azia Komisiono, kadre de fermita kunsido, je la 13h30 dimanĉe en la salono Dratwer, kaj partoprenos nur KAEM-anoj kaj po unu plenrajtigita reprezentanto de landaj asocioj.
- la DUA kunsido okazos je la 14h15 lundon en la sama salono, nome de azia agado, kiun rajtos partopreni ne nur ĈIUJ azianoj sed ankaŭ ali-kontinentanoj. KAEM bonvenigas multajn partoprenantojn en la kunsido.

## KUNVENO DE EPĈ-LEGANTOJ

En la salono Hodler okazis kunveno de legantoj de "El Popola Ĉinio", kiun prezidis la redaktoro kaj partoprenis ĝin redakcianoj. La gazeto, kiu en majo festis sian 50-jariĝon, fariĝis grava informilo de la Ĉina Respubliko kaj E-movado ĝenerale. Estis proponoj ke la gazeto iom ŝanĝu la redakciajn tekstojn, ke estonte ĝi aperigu pli da literaturaĵoj, pli da tekstoj pri Esperanto tra la mondo, eĉ pri apero de la infana paĝo.

Kvankam "El Popola Ĉinio" fariĝis fakte internacia, kun kelkmil abonantoj tra la tuta mondo, la partoprenintoj estis por plia internaciiĝo de la gazeto.

Krom tiu kunveno okazis ankaŭ kunveno de aŭskultantoj de Ĉina Esperanto Radio Internacia, kiu antaŭ nelonge festis 35-an datrevenon. Fakte, ĉi tiu radio-stacio ne estas aŭdebla tra la mondo, pro kio la ĉeestantoj klopodas ke ĝi atingeblu pere de interreto. Tiam la aŭskultantoj estus dekoble pli multaj.

(k. n. 670)

IKEF, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, lundon vizitos la faman ESHED, produktanton de robotoj kaj aliaj altteknologiaj sistemoj.
Aliĝu ĉe la budo de IKEF.
Partopreno en buskostoj: 20 sikloj.
Forveturo: lundon je la 9h00, antaŭ la kongresejo.

(k. n. 523)

## BRILAJ PREZENTOJ

Ne estas kutimo laŭdi preleganton de la internacia kongresa universitato antaŭ ol la serio de lia/ŝia prelegoj finiĝis. Mi tamen jam nun volas atentigi ĉiujn legantojn de la kuriero pri la okazaĵoj en la salono Olswanger, kie s-ro Tonkin eble klopodas prelegi pri la verkoj de Shakespeare, sed ofte li vere ludas la spektaklojn. La homoj kiuj devas frue vekiĝi por ĉeesti, revenas. Gajaj ridoj de tempo al tempo ondas tra la salono. Kuniĝas memoroj pri legitaj aŭ viditaj spektakloj kun deziro spekti pli.

(k. n. 182)

## OPINIOJ PRI LA 85-a UK

### LAŬDOJ

La prelego "Juda humuro" estis perfekta. Bonŝance jam hejme mi legis fake pri la temo. Kun plej granda intereso kaj plezuro mi aŭskultis. Elkoran dankon! (k.n. 647)

### KRITIKOJ

Starante mi ĉeestis dum aranĝo en salono Dratwer. Ĉirkaŭ 8 personoj sidis sur la planko. Mi iomete ne komprenis la situacion, ĉar estis loko por dek pliaj seĝoj. (k. n. 474)

Mi volis partopreni en iu ekskurso sabate. En la unuaj tagoj la atendovico estis longa. Kiam mi devis pagi, neniu ekskurso havis liberajn seĝojn. "La koverto estis malplena". Mi esperis, ke ili povos havi alian liston. (k. n. 331)

## BANKEDO KAJ KONGRESA BALO

"Mi ne bankedas, ĉar la manĝo neniam valoras la elspezon", mi ofte aŭdis dumkongrese. Ĉi-jare tio certe ne taŭgas. Ne nur la pladoj estis tre diversaj kaj bongustaj, ankaŭ pri trinkaĵoj oni bone zorgis. Eĉ post la deserto oni ne nur alportis kafon aŭ teon, sed ankaŭ denove akvon kaj oranĝosukon tiel ke alvenintaj amikoj por la balo iom povis profiti. La orkestro tiel bone muzikis ke homoj kiuj intencis nur iom flari la etoson subite troviĝis inter la dancantoj. Granda surprizo estis, ke la kantisto de nacia vespero denove kantis por ni. Preskaŭ seninterrompe la muzikistoj ludis kaj la aŭskultantoj/dancantoj amuziĝis. Ĉu nun iliaj piedoj doloras kiel la miaj?

(k. n. 182)

**AĈETEBLAS KASEDOJ PRI LA NACIA VESPERO**
**Aĉetu ĉe la Informejo!**

## MEDICINISTA KUNVENO

Ĵaŭde, la 27-an de julio okazis la kunveno de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). Ĉeestis 28 personoj el 15 landoj. Prezidis kaj raportis d-ro I. FERENCZY (k.n. 288). Li raportis inter aliaj pri la sukcesa kunlaboro kun la fervojistoj (IFEF). Dum la fervojistaj E-kongresoj UMEA donis la sanitaran deĵoron ili interŝanĝis eldonaĵojn ktp.

La ĉi-jara UMEA - SHINODA-PREMION ricevis s-ino GU JIENHUA (Ĉinio) pro sia verkita vortaro Esperanta-ĉina-angla. Venontjare estos la 100-jara naskiĝdatreveno de d-ro HIDEO SHINODA, iama prezidanto de la Asocio. Li mortis en la jaro 1984. UMEA deziras inde festi la datrevenon. La Internacia medicinista E-konferenco okazos en urbo OSIJEK, antaŭ la UK (Zagrebo, Kroatio).

Inter la alparolantoj, prof. R. SACHS, prezidanto de ISAE salutis la ĉeestantojn kaj proponis viglan kunlaboron kun la medicinistoj.

d-ro I. Ferenczy (k.n. 288)

## ALVOKO AL KRISTANOJ

Karaj kaj estimataj kristanaj gefratoj inter la partoprenantoj de la 85-a UK!

La KELI-prezidanto pastoro Adolf Burkhardt petis la germanan KELI-membron Gerhard Hofmann preni la respondecon pri la kunveno de la Kristana Esperanta Ligo Internacia.

La KELI-kunveno okazos lunde (31-an de julio) inter 12h30 kaj 14h00 en la salono Dratwer (Golan). Kune kun d-ro Puramo Chong, kiu estas KELI-membro ekde 25 jaroj, G. Hofmann preparis programon, kiu verŝajne estos interesa por ĉiuj kristanoj. Interalie vi aŭdos salutvorton de A. Burkhardt per sonbendo kaj prelegeton de P. Chong pri la situacio de kristanismo en ambaŭ (suda kaj norda) Koreioj.

Ĉar dum nia UK ne okazos ekumena diservo ni tre kore invitas ĉiujn kristanojn partopreni al la KELI-kunveno.

Gerhard Hofmann    Puramo Chong

ATENTU! Hungardevenaj esperantistoj kiel kutime dum la UK-oj oni renkontiĝas la 30-an de julio 2000 (dimanĉe) je la 19h30, ĝis la 20h30 en la salono Hodlet. Oni atendas vin. VARUNK.

## NACIA VESPERO

Kvankam la kvalito de la spektaklo estis tre kontentiga, oni povas bedaŭri, ke ĝi ne vere kongruis kun la kongresa temo.

Dancistaro militvestita ne tre taŭge ilustris "kulturon de paco", krome dum kongreso de pacamantoj.

Oni povas ankaŭ esperi ke la araba kulturo aperos alimaniere ol tra la Jemenhebrea.

Mi eĉ konfesas, ke mi reve imagis spektaklon finiĝantan apoteoze per komuna programero de du artistaj grupoj, unu hebrea, alia araba, unuiĝintaj en esperantlingva kanto. Tio jes ja estus respegulinta la kongrestemon "Lingvo, kulturo de paco". Bonŝance, la revo ĝuste ekzistas por helpi min eskapi la realan vivon.

(k. n. 479)

KATOLIKA MESO okazos dimanĉon je la 12h00 en la preĝejo de Sankta Petro en Jafo, kiun oni atingas piede laŭ la strato apud la strando, aŭ per buso n-ro 8, de la haltejo kontraŭ la kongresejo. La meson celebros pastro Manfred Odenwald (k.n. 631).

## FERVOJISTA KUNVENO

Vendrede, la 28-an de julio okazis la kontaktkunveno de IFEF. Istvan Gulyas, vicprezidanto de IFEF prezidis kaj raportis pri la pasinta IFEF-kongreso.

La kunvenon ĉeestis 21 kongresanoj el dekunu landoj.

En la nomo de la Estratro de UEA Petro Chrdle salutis la ĉeestantojn, kaj detale informis pri la sekvontjara IFEF kongreso okazonta en Tabor (Ĉeĥio).

D-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA faris fakprelegon pri la spertoj de la kunlaboro inter fervojistoj kaj medicinistoj.

Poste sekvis vigla diskuto pri movadaj aferoj, varbeblecoj, edukado kaj pri la manko de la junularo en la Esperanto-movado.

(k. n. 287)

## SAT-kunveno

La 27-an de julio en la salono Maschler inter la 11h45 kaj 12h30 okazis kunveno de SAT, kiun gvidis Yamasaki Seiko. La SAT-plenumkomitaton reprezentis Floreal Gabalda. Partoprenis 40 homoj, el kio 14 nemembroj de SAT.

Nome de faka agado de UEA la kunvenon salutis Petro Chrdle. Sian mesaĝon al la kunveno sendis Yves Peyrant, kiu elstarigis la neceson de unuiĝo por trovi taŭgan solvon de la ekzistantaj krizoj.

El la demandoj de la partoprenantoj ni elstarigu la jenajn:
- Jacques Caubel rekomendas, ke la landnomoj klare aperu, sed la respondo ricevita estis, ke SAT-membroj estas mondcivitanoj, kaj tial la landnomo ne gravas.
- Margarete Bettmann demandis ĉu estas arabaj SAT-membroj. Ĉar la asocio ne atentas pri tiaj statistikoj, la demando estas malfacile respondebla. Ĉiuj, kompreneble ankaŭ araboj, estas bonvenaj en SAT
- Vincent Charlot petis pri raporto el la ĵus okazinta SAT-kongreso en Moskvo. Yamasaki, kiu partoprenis nur dum 3 tagoj, donis skizon. Li aparte elstarigis la proponon de Martin Bustin, kiu sugestas ke la SAT-plenumkomitatanoj ne devige estu nur en la sama urbo.

Kep Enderby, SAT-membro, nuna prezidanto de UEA, elstarigis, ke la nocioj pri naciismo, naciulo estas nur en la homaj mensoj, ĉar la homoj nur hazarde naskiĝas en unu aŭ alia loko.

Dieter Rooke demandis "Kio estas SAT?", kaj Gabalda sendos detalajn informojn.

(redakcia teksto laŭ la protokolo de G. Ledon)

### Anonco por la partoprenintoj de la PLAĜBALO

(okazinta lastan mardon)

La LKK decidis redoni al vi parton de la pagita kotizo. Pri la preciza sumo oni povos decidi nur post la fintraktado kun la "nutriga" restoracio. La repago estos farota per kreditigo de la UEA-konto de la mendintoj.

## TEMPOTRAKO UNUAFOJE EN UK

La TEMPOTRAKO estas sociala terapio, kiu helpas la homojn liberiĝi de antaŭnaske spertitaj ŝokoj kaj traŭmoj.

Ĝi funkcias jam plurajn jarojn en Germanio, iris dufoje al Afriko. En 1990, dum la Unua afrika kongreso en Togolando, ĝi estis prezentita al la kongresanoj. En julio 1995 okazis unusemajna seminario pri ĝi en la ĉefurbo Lome de Togolando.

Travagante nun la tutan mondon, ĝi atingas ankaŭ la Universalan Kongreson de UEA.

Dum la 85-a UK en Tel-Aviv la metodo estas prezentata al la kongresanoj pere de Margareta Bettmann (k. n. 121) ĉe la budo "Tempotrako" - Afrika agado kaj Gbeglo Koffi (k. n. 95).

## ARTISTOJ KAJ ARTISTINOJ KIE VI ESTAS?!?

NI ATENDAS VIN DIMANĈON JE LA 11h00 ANTAŬ la ENIREJO de LAPENNA

Provludoj por la Internacia arta vespero daŭros ĝis la 14h00 en la salono Zamenhof.

(Tiuj kiuj venos post la 11h00 devas serĉi la malantaŭan enirejon (ĉe kafo-baro) al Zamenhof, ĉar ne eblas eniri tra la salono Lapenna).

### ANONCO POR KANTEMULOJ
## INTERNACIA ĤORO FUNKCIAS

Gvidas: Tova Ben-Cvi (Israelo) kaj Elena Puĥova (Rusio-Ĉeĥio)

Venu laŭ la tempo anoncita en la Kongresa libro. (Vendredon kaj dimanĉon je la 18h30 kaj lundon je la 12h30).

## KUNVENO DE VIRINOJ NE MANKIS ANKAŬ ĈI-JARE

Ĵaŭde ek de la 10h45 ĝis la 11h30 en Salono Maschler okazis la kunveno de Virina Agado. Ĉeestis 25 homoj kaj gvidis f-ino CHOI YUN HUY, Hortensio.

Jam pasis du jaroj de kiam ĝi fondiĝis kaj la ĉeestantoj rimarkis, ke membroj solidariĝas jaron post jaron kaj ili proponas pli konkretajn aferojn por virina agado.

Estis kelkaj proponoj jene:
- ni aliĝu al UEA en baldaŭa estonteco,
- ni elektu multe da virinoj agemaj kaj laboremaj en Esperantujo,
- ni laboru ne nur ene de movado, sed ankaŭ ekster ĝi,
- ni interŝanĝu opiniojn kaj proponu per ret-poŝto,

Ne mankis kritikoj pri la diskriminacio inter viroj kaj virinoj jene:
- ofte oni elektas virojn por labori kaj virinojn por ornami eĉ en Esperantujo.

Unu grava miskompreno estas ke virina movado estas feminisma movado, sed ne.

Laste gvidantino proponis, ke ni havu propran hejmpaĝon se eblas.

Virina agado daŭre havas jarkunvenon en estontaj UK-oj kaj en aziaj kongresoj.

Apartan dankon al viraj ĉeestantoj, speciale al d-ro Werner Bormann.

(k. n. 227) hortensio@hanmail.net

# STEL-AVIVO
## senpaŭze

KURIERO DE LA 85-a UK • Numero 6 • 31-an de julio 2000

## JARKUNVENO DE ISAE

Dudeko da interesatoj pri sciencaj aferoj, inter ili 6 ISAE-anoj, ĉeestis vendrede, la 28-an de julio, la laŭstatutan dumkongresan jarkunvenon de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). La prezidanta raporto informis pri la rezulto de la komencjara balotado: elektiĝis por la nova ISAE-estraro prof. Eichner (Aŭstrio), prof. Haszpra (Hungario), s-ro Sugano (Japanio), d-ro Weichert (Svedio) kaj prof. Sachs (Germanio) - la lastnomita samtempe estis elektata ISAE-prezidanto. Tute internacia estraro do respondecas por la asociaj aktivecoj dum la trijara estrarperiodo por 2000, 2001 kaj 2002.

ISAE en kiu asocio unuiĝas fakuloj kaj interesiĝantoj pri sciencaj aferoj, celas la disvastigadon de la Internacia Lingvo en ĉiujn sciencajn kaj teĥnikajn sferojn. Al tiu celo servas ankaŭ la asocia organo "Scienca Revuo", kiu peras sciadon pere de originalaj artikoloj kaj aliaj sciindaĵoj el la vasta mondo de scienco.

Estas projektita la eldono de prifakaj kompendioj kiel kromkajeroj al Scienca Revuo por subteni la instruadon de studentoj, ekz. kadre de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. Per pligrandigo de la delegita reto de ISAE kaj reaktivigo de la statutaj ebloj por krei landajn filiojn kaj fakajn sekciojn, ISAE celas pli efikan sciencan laboron. La nova estraro ankaŭ alstrebas kunlaboron en terminologio, ekz. kadre de la regule en Prago okazanta Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), same kiel pli da faka interŝanĝo kun la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA).

(k. n. 258)

## EKZAMENA SESIO DE UEA/ILEI

Estis 2 kandidatoj, unu el Sud-Afriko por la meza nivelo, unu el Aŭstralio por la elementa nivelo. Ambaŭ sukcesis kun la mencio BONA.

Gratulon al ili!

Mireille Grosjean,
prezidantino de la surloka ekzamena komisiono

Tel-Avivo
30-an de julio 2000

## LA TUTA MONDO AŬDAS NIN

ILERA, la Internacia Ligo de Esperanto-radio-amatoroj, havas amatoran radio-stacion en ĉambro 1823 de tiu ĉi hotelo (Dan Panorama!). Grandan antenon ni starigis sur la tegmento. Ĝi estas tre efika, tiel ke ni jam atingis radio-amatorojn en ĉiuj kontinentoj. Ni atingis multajn landojn. Inter ili estis i.a. Brazilio, Usono, Aruba-insuloj, Ĉinio, Japanio, Kubo, kaj ĉiuj landoj de Eŭropo. Eĉ la Antarktikon ni kontaktis kaj tien informis, ke Esperanto vivas kaj bone funkcias. Entute ĝis hieraŭ ni kontaktis pli ol 1700 staciojn, inter ili diversajn en Esperanto.

Krom mikrofonon kaj morso-klavon ni ankaŭ uzas komputilon por skribaj komunikoj simile kiel en interreto.

Post la kongreso ĉiu partnero ricevos nian konfirmkarton kiel memorigilon, memkompreneble presitan en Esperanto.

(k. n. 322)

## AŬKCIO

Kiel kutime, en la Aŭkcio oni vendos tre valorajn raraĵojn, kiuj estas normale malfacile haveblaj. Krom la librojn, oni aŭkcios ankaŭ aliajn esprantaĵojn, interalie ankaŭ kongresnumeron 1 por la 86-a UK, okazonta en Zagrebo.

La Aŭkcion gvidos s-ro Humphrey Tonkin.

**LUNDON, je la 16h30 en la salono LAPENNA**

# RAPORTO PRI FAKKUNSIDO DE OOMOTO

La fakkunsido de Oomoto okazis sub la titolo de la kongresa temo de la 9h30 ĝis la 11h30 ĵaŭde en la salono Zamenhof. Oni prezentis preĝon por mondpaco per ŝintoisma rito, Ludon de Jakumokotoo (japana tradicia dukorda citaro), du kantojn el "Aizenka" (Amobonaj kantoj), prelegon pri la kongresa temo, lumbildojn pri Oomoto-agado, japanan dancon, aikidon (unu el japanaj batalartoj) kaj teceremonion. En ĝi ĉirkaŭ 200 personoj partoprenis kaj gustumis "matĉa"-n (japanan verdan teon).

# JURISTOJ KUNSIDIS

La 27-an de julio, je la 17h15 kunsidis 12 membroj de la Esperanta Jura Asocio (EJA), prezidate de la prezidanto de la Asocio s-ro Kep Enderby. Post disdono de la lasta numero de la revuo "Jura Tribuno Internacia", oni elstarigis la taŭgecon de la revuo kaj la bonan laboron de ĝia redaktoro s-ro Jose Maria Rodriguez. Pro neĉeesto de la sekretario, oni ne povis raporti pri la laboro farita dum la jaro. Kelkaj interesaj proponoj aperis, inter ili tiu de advokato s-ro Faria de Bastos el Portugalio pri starigo de reto de advokatejoj en la Eŭropa Unio, pri verkado de artikoloj en la revuo pri diverslandaj sistemoj pri civila kaj krima juroj, kaj pri la studo de ebleco ke nia asocio aliĝu al la Internacia Jura Asocio.

(k. n. 136)

# OPINIOJ PRI LA TEATRAĴO EL LA PUBLIKO

Honore al la gastiganta lando, zagreba aktorino Vida Jerman surscenigis "La Poto"-n de Ŝalom Alejĥem, kunlabore kun aktoro Ranko Stojiĉ. Granda investo de energio, granda profesia engaĝiĝo, digna atento al la hebrea kulturo.

Ni petis komentojn de la publiko.

- Mi ŝatus vidi pli fortan aktivecon de la rabeno.
- Mi preferus ke Vida ne tenu la saman kreŝĉendon dum la tuta spektaklo.
- Vida estas unika.
- Mi ne komprenis la teatraĵon, mankis al mi kultura fono.
- Mi konsilus pli bonan redaktadon de la teatra broŝuro.

# Jarĉefkunveno de IKEF

La 28-an de julio en la Ĝenerala Kunveno (jarĉefkunveno) de IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) 20 ĉeestintoj (15 membroj, 5 interesitoj) aŭskultis kaj akceptis la raporton pri la agado de IKEF en 1999 de prezidanto Franz Josef BRAUN kaj la financan raporton de la financa konsilanto Roland ROTSAERT. La jaro 1999 estis sukcesa: la nombro de membroj plialtiĝis de 136 al 149; la enspezoj estis pli altaj ol la elspezoj; la eldono de "INKOTERMOJ 2000" (esperantigo de "INCOTERMS 2000" de la Internacia Komerca Ĉambro en Parizo) estis laŭplane realigita por ĉi tiu kongreso (havebla en la libroservo); nova retpaĝaro (www.ikef.org) estis establita, kaj ĝenerale la aktivecoj plialtiĝis.

En la elektoj al la estraro estis reelektitaj prezidanto Braun kaj la estraranoj d-ro Rainer Kurz (Germanio) kaj s-ro WANG Tianyi (Ĉinio), de kiuj la dujara oficperiodo finiĝos ĉimonate. Ĉefa temo en la diskutado estis la estonta terminara laboro. Oni decidis, ke la "Laborplano 1998-2000" establita kaj akceptita en 1998 en Montpeliero kadre de la UEA-kampanjo 2000 por internacia lingva ordo, estos daŭrigata je pliaj 3 jaroj, do ĝis 2003.

(k. n. 786)

# ZAGREBO INVITAS

Ni invitas vin al la prezento de la 86-a UK okazonta en Zagreb, lundon , la 31-an de julio, je la 11h30 enla salono Lapenna.
La kongresa temo:

## KULTURO DE DIALOGO - DIALOGO INTER KULTUROJ

## LA KONGRESEJOJ

Dum la Universala Kongreso en Zagreb la kongreso okazos en du ejoj: La koncertejo "Vatroslav Lisinski" kaj Fakultato de Elektroniko kaj Informatiko, nomata FER.Ambaŭ ejoj troviĝas en la sama strato, ilin dividas la urbodomo de Zagreb. La ejoj estos kunligitaj per busetoj. La koncertejo "Vatroslav Lisinski" en sia ĉefa salono povas akcepti 2000 personojn. La kongresanoj kiuj aliĝos post la unuaj 2000 spektos la malfermon en apudaj salonoj apud la ĉefsalono. Ni invitas vin ĉiujn al frua aliĝo kaj dankas pro komprenemo.

Bonvolu ĉe la zagreba giĉeto preni kroman prospekton pri Zagreb por viaj geamikoj!

## KUNVENO DE AERA

En la salono Maschler, la 30-an de julio okazis kunveno de AERA (radio-aŭskultantoj), al kiu partoprenis kaj radio-aŭskultantoj kaj la redaktoroj de pluraj radio-stacioj kiuj sian programon elsendas en Esperanto. La kunvenon prezidis s-ino Barbara Pietrzak, la redaktorino de Pola radio. Kvankam la Radio Varsovo elsendas jam 41 jarojn, Ĉina Radio Internacia - 35 jarojn, Radio Havano - 12 jarojn - estis interese aŭdi, ke elsendas ankaŭ Radio Bratislavo, Radio Vieno, Radio Romo, Radio Koreio ... kaj ke radio elsendoj en la Internacia Lingvo estas aŭskulteblaj je alia flanko de la mondo. Tamen, por ke ĝi fariĝu pli aŭdebla kaj vere internacia, la programo devas orientiĝi al interreto.

S-ino Pietrzak deziris substreki rolon de la elsendoj kaj aŭskultantoj, des pli ĉar la Pola Radio intencas de tempo al tempo enkonduki novajn rubrikojn, bazitajn je proponoj kaj reago de aŭskultantoj.

Inter la berlina kaj tel-aviva kongresoj, pere de Pola Radio estis starigita elsendo pri NATO kaj la Eŭropa Unio (kiuj estis dediĉitaj al tiamaj okazintaĵoj en Eŭropo kaj Pollando).

Samtiel estis enkondukita religia (precipe katolika) rubriko kaj samtiel unufoje monate literatura rubriko, kaj oni eĉ planas enkonduki porinfanan rubrikon.

Inter la geredaktoroj de radio stacioj kiuj elsendas en Esperanto, estas interŝanĝitaj spertoj, kaj estis dirite, se la radio-programo estus en interreto aŭ elsendata per satelito, tiam estus kontentiga aŭskultado kaj reagoj de la aŭskultantoj.

(k. n. 670)

## KIO ESTAS TIO?

Dum ĵaŭda renkonto de matematikistoj oni pridiskutis, interalie, du prefiksojn (pozitivan kaj negativan) per kiuj oni prononcu iun ajn nekutiman aŭ eĉ kutiman nombron.

Ĉu vi scias, ekzemple, kiel prononci unuon kun ... dudeko da nuloj ($=10^{20}$)?

Jen la solvo: aj-dudek (por $10^{20}$)

kaj mi-dudek (por $10^{-20}$).

Kio estas tio, ĉu aĉa reformaĵo aŭ utila invento?

## PERDITA KAJ RETROVITA

Multaj el ni perdis ie survoje dum la jaroj la veran celon de nia agado. Vendrede, ni povis retrovi ĝin. Atilio Orellana Rojas prelegis pri la projekto "Indiĝenaj Dialogoj" - fluo de libera, rekta komunikado inter la indiĝenaj popoloj.

La projekto celas uzi Esperanton kaj la interreton, kiel ilon de rekta komunikado inter la homgrupoj kiuj plej bezonas kaj mankas ĝin. Ili nun havas problemojn komuniki eĉ en siaj propraj landoj, kaj kun la najbaraj indiĝenaj popoloj. Tia propono, tutmonda komunikado kun la aliaj popoloj kun similaj problemoj ŝajnas esti eĉ pli utopia ol nia "fina venko", tamen estas la vera realigo de la celoj de Esperanto. Se jam post la du unuaj kursoj povas esti rekta komunikado inter kontaktpersonoj de Tlingita (Alasko), Ŝora, Samea kaj Komia (Rusio), Mapuĉa (Ĉilio) kaj Majaa (Gvatemalo), Brunka kaj Bribria (Kostariko), Batva (Ruando), Manipura, Ho, Bodo kaj Garasia (Barato), Papua (Novgineo), Tamang (Nepalo), Tamaŝeka (Burkino, Niegero kaj Maŭritanio), Berbera (Maroko) tio estas admirinda komenco.

(k. n. 403)

## POŜTISTOJ

La 30-an de julio okazis la ĉefkunveno de IPTEA (Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio), kiun prezidis prez. Veikko Maki-Luopa el Finnlando (k.n. 1171).

Li prelegis pri la plej nova telekomunikada servo t.n. INTERNET (Interreto), kiu ekfunkciis komence en Usono en 1969 fare de la tiea Ministerio pri Defendo. Hodiaŭ ĉiun kvinan sekundon al la Interreto estas aligita nova komputero, do pli ol 6 milionojn jare.

La komputero estos alligita al la telefonreto per modemo, kiu transformas la digitalajn signalojn de la komputero en la analogajn voĉsignalojn por la telefonreto kaj male. Antaŭ la transmisiotan mesaĝon oni devas skribi por la adreso"www. NOMO.XYZ (=landliteroj)". La tri unuaj literoj "www" signifas "World Wide Web" (Monda Vasta Ondaro = MOVO). En Esperanto oni povus skribi ankaŭ Tut-Tera Teksaĵo = TTT, diris Leif Holmlund el Svedio.

Per Interreto oni povas telekomuniki ne nur tekstojn kaj bildojn, sed ankaŭ aŭskulti muzikon kaj rigardi TV-programojn. Oni povas "foliumi" aŭ "surfadi" retpaĝojn, faritajn de diversaj gazetoj, TV-kanaloj, entreprenoj, lernejoj, aŭ ordinaraj homoj.

Kolektanto de uzitaj telefonkartoj el Slovakio proponis al la IPTEA, aldoni al la filatelo novan branĉon kiu povus esti nomata "telefonkart-kolektado". Ŝi jam prezentis multajn tiajn kartojn kun belaj fotoj kaj desegnaĵoj.

Veikko Maki-Luopa (k.n. 1171)

# JARKUNVENO DE NEFUMANTOJ

En la salono Maschler, la 30-an de julio 2000, okazis Jarkunveno de nefumantoj - TADEN, kun 20 partoprenantoj.

La prezidanto kaj redaktoro de "Puraj Pulmoj", s-ro Jan BEMELMANS, donis la ĝeneralajn informojn: kio estas TADEN, kio estas ĝia agadkampo kaj informis pri evoluo de scioj kontraŭ fumado kaj fumismo, sed ankaŭ pri kuracado de kancero kaj aliaj malsanoj. Lige kun fumado li alvokis la ĉeestantojn se eble el diversaj landoj fariĝi membroj kaj estraranoj. Estis sugestite, ke en la kongresa regularo aperu artikolo pri nefumado en la kongresejo. La estraro ricevis salutleterojn, inter kiuj de Marjorie Boulton, en kiu ŝi donas sian starpunkton pri la agado de la estraro.

(k. n. 670)

Ja sonis kritiko al tiuj kiuj kontraŭ la reguloj fumĝenis tiujn kiuj estas malimunaj. Sed ankaŭ dankon pro la interveno de KKS kaj la kongresa kuriero.

(k. n. 181)

# ĴURNALISTOJ KUNVENIS

Dimanĉon, la 30-an de julio, en la salono Maschler, kunvenis ĵurnalistoj sub la iniciato de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio). La kunvenon prezidis vicprezidanto s-ro YAMASAKI Seiko, anstataŭ s-ro Stefan Maul, kiu forestis pro malsano. Kolektiĝis 11 kongresanoj, inkluzive de 5 TEĴA-membroj. La sekretario/kasisto laŭtlegis saluton de la Prezidanto S. Maul, kiu skribis interalie: "Kiel scias precipe la ĵurnalistoj inter vi, la ankoraŭ daŭranta revolucio en komunikado - precipe la pli kaj pli potenca interreto - draste ŝanĝis kaj ŝanĝos ankaŭ laboradon de ĵurnalistoj. Bedaŭrinde la teknika progreso ofte estas akompanata de perdo de kvalito. Rapideco pli gravas ol solida informado, distro pli gravas ol serioza enhavo ktp. Jen defio por konsciaj ĵurnalistoj." La sekretario klarigis la historion de la Asocio por la membroj kaj raportis ke la financa stato de la Asocio estas solida por permesi eldonadon de la organo "Internacia Ĵurnalisto", 3-4-foje jare, post la krizo antaŭ kelke da jaroj. Du el la ĉeestantoj aliĝis al la Asocio. (k. n. 59 kaj k. n. 670)

# KUNVENO DE LIBE

La kunvenon de LIBE, okazintan la 30-an de julio inter la 16h15 kaj 17h00 ĉeestis 16 kongresanoj, inter kiuj 8 vidhandikapitoj, el 7 landoj. Prezidis Jan Bemelmans (NL). Post voĉa sinprezento de la ĉeestantoj, li skizis la funkciadon de LIBE (1954, post UBO/UABE). La Jarlibro de UEA informas pri ĝi inter aliĝintaj Fakaj Asocioj. Kontentigas la kongresa materialo en adaptitaj formoj (Oni laŭdas la tujan ricevon de la brajla programo). krom la specifa sinprezento, blinduloj bezonas pli da priskriboj dum ekskursoj.

Eva Bojaĝieva mallonge prezentas la 66-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en Plovdiv (BG, 5-12 aŭg.).

Grava sciigo rilatas la forpason de la kasisto/redaktoro de LIBE, Jan Verheule, lastjare.

Rekte tuŝas la partoprenantojn la evoluo pri la decido ke vidhandikapulo sen akompananto ne rajtas aliĝi al UK. Pluraj reagis kolere. Jan Bemelmans persone retkontaktis estraranojn de UEA, kiuj tuj respondis. KKS Raŝiĉ retmesaĝis ke tiusence la Kongresa Regularo unufoje estis aplikita al persono kiu en Adelajdo (1997) ĝenis ankaŭ neesperantistojn.

La konkludo ke la kongreso ne respondecas pri la sekureco de handikapitoj, ja liberigas la vojon al aliĝo de sendependaj partoprenontoj. S-ino N. Kasymova insistas ke tio aperu en la revuoj "Esperanto" kaj "Esperanta Ligilo" (porblindula).

S-ino Olena Posivana aparte laŭdas japanajn vidantojn, kiuj senpage dissendas la interesan "La fratoj" en brajlo. Jan Bemelmans petas ke iu transprenu de li, tro ŝarĝita, la voĉlegadon de "Esperanta Ligilo" (por 12 pagantaj abonantoj). Fine s-ro Ilja Miklaŝevskij petas kunlaboron ĉe interŝanĝo de Esperanto-materialoj, i.a. per la reto.

## AŬTORAJ DUONHOROJ
## Lundon je la 16h00
## Geraldo Mattos.

# ĈIES HELPO BEZONATA

Kongresano Sigitas Zilionas (k.n. 1051) alveturis per aŭto el Litovio. Post la longa vojaĝo, lia aŭto estis priŝtelita apud nia kongresejo. Ni ĉiuj povas helpi lin por almenaŭ parte kompensi lian perdon, ĉu per malgranda monhelpo, ĉu aĉetante interesajn libron kaj kompaktdiskon el Litovio ĉe la stando de "Litova Stelo".

Istvan Ertl

# STEL-AVIVO
senpaŭze

KURIERO DE LA 85-a UK • Numero 7 • 1-an de aŭgusto 2000

## REZOLUCIO
## DE LA 85-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 85-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Telavivo, Israelo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto de la jaro 2000-a, kun 1212 partoprenantoj el 61 landoj,

**deklaras** ke:

- en tiu ĉi Internacia Jaro de Kulturo de Paco necesas refortigi la tutmondajn klopodojn trovi komunajn kulturajn valorojn kaj interkonsentojn cele al konstruo de tutmonda Kulturo de Paco;
- tio ĉi okazos nur se en la mensoj de la homoj ni komune kreos tiun kulturon, ĉar daŭra paco estas konstruata nur en la mensoj de homoj;
- en tiu ĉi mondoparto, la Meza Oriento, kie kunvenas malsamaj kulturoj, kaj kie riĉa historio samtempe unuigas kaj dividas homojn, apartaj streboj estas bezonataj kaj jam farataj en serĉado de paco;
- kondiĉo por paco estas la respekto de ĉiuj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj inkluzive de la lingvaj rajtoj de ĉiuj konfliktantaj grupoj;
- la internacia lingvo Esperanto estas kreita ĝuste por ebligi kulturon de paco inter malsamaj gentoj kaj pro sia neŭtraleco kaj pro sia rekono de la digno kaj samvaloro de ĉiuj hom-grupoj ĝi donas grundon, sur kiu valoroj de paco povas flori;

**alvokas**

ĉiujn internaciajn organizaĵojn, ĉiujn registarojn kaj ĉiujn homojn

- ke ili decide ek-respektu la lingvajn homajn rajtojn cele al lingva kaj kultura demokratio en la mondo kaj subtenu la klopodojn de la Esperanto-movado en tiu kampo;

**deklaras** la pretecon de la Esperanto-movado:

- plulabori por kulturo de paco en la mondo surbaze de reciproka respekto kaj egalvaloro de ĉiuj gentoj kaj hom-grupoj grandaj kaj malgrandaj;
- agi ĉie, kie paco estas minacata, apoge al la ceteraj klopodoj de la internacia komunumo;

**esprimas**

- sian admiron kaj subtenon al la klopodoj de la homoj de ĉi tiu regiono, kiuj laboras por krei la eblecon de kulturo de paco, kiu estas antaŭkondiĉo por alveni al situacio de paca kunvivado kaj de respekto ambaŭflanka de la homaj rajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj por ĉiuj.

## AZIA MOVADO

KAEM (la komisiono pri Azia Esperanto-Movado) okazigis kunsidon por azia agado je la 14h45 la 31-an de julio. En ĝi partoprenis kelkdeko da partoprenintoj, inter kiuj ne mankis ankaŭ ne-aziaj esperantistoj. Oni aŭdis la raporton de movado de KAEM dum la lasta jaro, inter kiu plej grava evento estis la sukcesa okazigo de la 2-a Azia kongreso okazinta lastjare en Hanoj, Vjetnamio kun la partopreno de pli ol 500 esprantistoj el 12 landoj.

Oni raportis pri la organo de KAEM, "Esperanto en Azio", kiu eldoniĝas tri-foje en la jaro kaj kiu tamen ne plu senpage estas dissendata al riĉaj ne-aziaj landoj, sed sendata kun la pago de 20 eŭroj da helpmono por azia movado. S-ino Syozi raportis, ke dum la lasta jaro KAEM senpage membrigis al UEA 42 aktivajn esperantistojn el Azio, kaj ĝoje anoncis, ke UEA ankaŭ estas preta plu akcepti la membrojn laŭ la permeso de fonduso.

Ĉina, japana, korea, nepala reprezentantoj raportis pri siaj landaj movadoj dum la lasta jaro, kaj s-ro Yu Tao raportis koncize pri IJK, kiu baldaŭ okazos en Hongkongo. D-ro Lee Chongyeong el Koreio raportis pri la preparsituacio de la 3-a Azia kongreso, kiu okazos en la jaro 2002. Aparte menciindas, ke Nepala E-Asocio ĉi-jare sendis al KAEM la oficialan proponon por gastigi en sia lando la 4-an Azian kongreson en la jaro 2005, kiun oni findecidos en venonta kongreso en Seŭlo.

## LA UK EN LA ISRAELA TELEVIDO

Granda atingo por la informado pri la UK: longa programo pri la UK estos dissendota en unu el la plej popularaj programoj de la nacia televido, "Roim Olam" (oni vidas la mondon). La kameraa teamo filmadis dum pli ol ses horoj en la kongresejo lunde posttagmeze. Interalie estis filmita la aŭkcio, la internacia vespero, la konversacia rondo, la libroservo kaj la radiostacio, kaj estis intervjuitaj multaj kongresanoj, inter ili Geraldo Mattos, la iama KKS Pompilio, Gbeglo Kofi, Vida Jerman, kaj LKKanoj Moŝe Ben-Porat, Josi Ŝemer, Rami Ŝlain kaj Amri Wandel. La programo estos elsendota la 5an de aŭgusto, sabate vespere je la 20a horo.

## NATURKURACADO

INA (Internacia Naturkuraca Asocio) kiel tradicie okazigis sian jarkunsidon, en kiu partoprenis pli ol 30 membroj kaj interesloj. Judita Rey, ĝenerala sekretariino, prezentis la laborojn de INA dum la lastaj jaroj ankaŭ kun la prezento de nova jarlibro, Naturkuracado 2000, 100-paĝa, kiu havis riĉajn diversajn informojn pri naturaj kuracmetodoj en la mondo. Ŝi klarigis, ke la individuaj membroj kun la pago de 20 eŭroj en la jaro ricevas senpage la gazeton, kaj la gazeto ankaŭ estas libere aĉetebla en libroservo de UEA je prezo de 10 eŭroj.

Sekvis la faka prelego de d-ro Puramo Chong, prezidanto de INA pri la temo de konstitucia medicino, kiu estas koredevena unika kaj tradicia medicino. la prelego akiris multajn atentojn de la partoprenintoj, kaj sekvis viglaj demandoj kaj respondoj kun diskutado. Oni povas ankaŭ informiĝi pri la movado de naturkuracado kaj de la organizo ankaŭ en ties TTT-paĝo de INA; www.esp-ina.com.

## SUKCESO ĈE LA URBESTRO DE TEL AVIVO

Dimanĉe posttagmeze okazis la akcepto de 160 kongresanoj ĉe la urbestro Ron Ĥuldai. La akcepto okazis en la centro Enav, apud la urbodomo. La parolada parto inkluzivis saluton de la urbestro, vortojn de la prezidanto de UEA Kep Enderby, kaj dankovortojn al la urbestraro de LKK prezidanto Amri Wandel, kiu ankaŭ interpretis.

La urbestro diris ke li demandas sin kial en la erao de interreto kaj angla kiel internacia lingvo oni bezonas ankoraŭ alian lingvon, sed tuj aldonis ke li kredas ke per ilia evidenta fervoro kaj persisto la kongresanoj kaj la esperantistoj sukcesos disvastigi la konnon de Esperanto en la mondo. Kep Enderby dankis por tiuj vortoj kaj por la varma akcepto, kaj donacis amason da libroj, kiujn la urbestro akceptis danke kaj kun humura demando ĉu okazos ekzameno venontjare. Amri Wandel dankis al la diversaj departmentoj en la urbestraro kiuj helpis al la kongreso nome de la LKK kaj ĉiuj kongresanoj, kaj donacis al la urbestro praktikan kaj malpezan donacon - ĉapon de la 85a UK. Survoje reen al la kongresejo la kongresanoj vidis la 10-metran salutŝildon kiun la urbestraro fiksis sur la urbodomo ĉe la placo Rabin, kies teksto bone resumas la akcepton: La urbo Tel-Aviv Jafo salutas la partoprenantojn de la 85a Universala Kongreso de Esperanto" en la hebrea kaj en Esperanto.

## NI TRAVIVU LA ISRAELAN KONGRESON ANKORAŬFOJE

Ankaŭ ĉi-jare jam post la finiĝo de la Universala Kongreso eblos reĝui la kongresetoson ankoraŭfoje danke al la sonraportoj de la E-Redakcio de Pola Radio - Radio Polonia. La ampleksaj sonraportoj pri la inaŭguro de la kongreso kaj ĝia fermo, pri kelkaj elektitaj dbatoj kaj interparoloj kun famaj kaj mezaj esperantisoj, surbendigitaj en Telavivo, Esperanto-Redakcio liveros dum la tuta aŭtuna periodo. Ni memorigu do, la elsendotempon kaj frekfencojn de la varsoviaj E-elsendoj.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 08,30-08,59 UT | | SAT | | |
| 13,30-13,55 UT | m | 41.18 | 41,23 |
| | kHz | 7285 | 7275 |
| 18,00-18,25 UT | m | 41.98 | |
| | kHz | 7145 | |
| 19,00-19,29 | | SAT | |

Por aŭskulti satelite vi devas elekti EUTELSAT II-F Hot Bird 13 – Oriento, Frekvenco 11.474 GHz, polarizado H, subportanto 7.38 MHz.

Konsideru, ke por aŭskulti laŭ la mezeŭropa tempo vi bezonas aldoni 2 horojn, ekzemple 08.30 + 2 h = 10.30. La Esperantlingvaj elsendoj de Pola Radio estas ankaŭ aŭskulteblaj per ret-radio: http://www.wrn.org/ondemand. Nia retadreso estas: esperantoredakcio@radio.com.pl

La nunjara kongreso estis la denova ŝanco por la ĉeestantaj redaktoroj de publikaj kaj lokaj radiostacioj, en rektaj interparoloj kun la aŭskultantoj kaj dum la faka kunsido de AERA, dividi opiniojn pri la situacio en diversaj radiostacioj, programinformoj. La kunsido ebligis ekscii pri la utiligo de la Esperantlingvaj programoj en la instruprogramoj kaj disvastigado de ili inter la esperantistoj ne disponantaj pri aŭdeblecokapabloj.

Ampleksa sonraporto pri tiu renkontiĝo aŭdiĝos ankaŭ en la elsendoj de la E-redakcio de Pola Radio.

Pro la fakto, ke en la raporto pri la renkontiĝo de AERA enŝteliĝis kelkaj eraroj mi ĝustigu, ke en la printempa elsendo, tempo kiu ankaŭ kongruis kun la emeritiĝo de la eksa estro de la E-redakcio de Radio Polonia, red. Andrzej Pettyn, okazis kelkaj ŝanĝoj, enkondukitaj laŭ sugestoj de niaj geaŭskultantoj. Estis interalie anstataŭigita la religia informbulteno per la bulteno kulturtema, estis enkondukitaj sportaj felietonoj. Viglan reagon de la aŭskultantoj elvokis la reenkonduko de la ĉiumonata literatura elsendo. Ne malpli viglan intereson elvokis la porinfana rubriko. Oni parolis pri novaj programeroj aŭdiĝantaj el Varsovio pri la pola membreco en NATO, nova magazino, dediĉita al la klopodoj membriĝi en la eŭropuniaj strukturoj, "Pollando en Eŭropo".

Oni konstatis senĉesan bezonon de korespondaj kontaktoj inter la aŭskultantoj kaj redakcio, pruvantaj la valoron kaj bezonon de la ĉiutaga lingvomedio, tre grava aparte por izlolitaj esprantistoj. Multe da atento oni donis al la utiligo de la E-elsendoj por la kreo de la komuna E-kulturo.

Barbara Pietrzak, estro de la E-elsendoj de Pola Radio

## OFICIALE FONDIĜIS ASTRONOMIA ESPERANTO-KLUBO

La iniciatinto kaj kunordiganto de la klubo, d-ro Alex Mikishev, bonvenigis la 17 ĉeestantojn per priskribo de la ĝisnuna aktivado kiu konsistis ĉefe el regulaj ĉiusemajnaj bultenoj per Interreto, kaj interŝanĝo de informoj kaj prilaboro de Astronomia Terminaro per tiu metodo, sed ankaŭ per eldono de 72-paĝa "Astronomia Almanako 2000".

La kunveno, post diskuto, principe akceptis konservi la ĝis nun uzitan nomon de la Klubo, sed prokrastis ĝis la venonta kunsido de AEK ĉe la "Kvinpetalo" decidon pri estontecaj kotizoj.

En la daŭro de duona jaro AEK akiris 62 membrojn kaj interesatoj en 22 landoj, el kiuj multaj estas profesiaj aŭ amatoraj astronomoj. Kuraĝigite de tre sukcesa kunveno la Klubo daŭrigos sian eldonan programon kaj grave kontribuos al jam aranĝita Astronomia kurso ĉe la "Kvinpetalo" en Bouresse (Francio) de la 1-an ĝis la 5-an de septembro.

Ĉiu deziranto povas viziti nian klubon virtuale ĉe la TTTejo: hhttp:/members.xoom.com/astro esp kaj sendi al la Klubo mesaĝojn laŭ astro-esp@esperanto.nu.

## Kiel skribi bele?

Ankaŭ dum tiu-ĉi kongreso oni vidas, ke ankoraŭ kelkaj ne uzas tekstprogramon, kiu kapablas skribi ĉapelitajn literojn. Oni vidis i. a. por "ĉi" : cxi, c^i, chi.

Jen ebleco, kiu kostas nenion kaj por kiu vi eĉ ne devas enŝovi disketon, kion ja kulturaj homoj ofte ne ŝatas aŭ povas. Unikodo tre verŝajne jam estas en via komputilo kaj atendas uzon.

Se vi posedas WORD, provu la sekvantan proceduron: Malfermu novan dokumenton en WORD. Notu la tiparon, kiun vi uzas. Poste alklaku: enmeti, special-signoj. Dekstre de la aperanta listo aperas "scroll"-ŝovilo. Per ĝi serĉu ĉapelitan Esperanto-literon, ekzemple la literon "ĉ". Se ne aperas scroll-ŝovilo, aŭ se ne enestas la Esperanto-literoj, reiru en la dokumenton kaj elektu alian tiparon.

Mi sukcesis kun Garamond, Lucida Sans Unicode, Lucida Console kaj aliaj.

Alklaku la Esperanto-literon, poste alklaku "enmeti" kaj la litero estos en via teksto.

Per mallongilo, angle "shortcut" tio funkcias ege pli komforte: post la alklako de la litero alklaku sinsekve: mallongilo, novan mallongilon puŝi, Ctrl c, alordigi, fermi. Por la majuskla C uzu simile mallongilo, Ctrl. Sh c, alordigi, fermi. La samon faru por ĉiuj E-literoj.

En la dokumento oni skribas ilin simple per Ctrl <litero>, majusklojn per Sh Ctrl. <litero>.

Post kiam la mallongiloj estas instalitaj je unu tiparo, ili ankaŭ funkcias je ĉiuj aliaj Unikodo-literaroj.

Averto: literaroj kun larĝeco de pli ol 100 kB verŝajne enhavas Esperanton.

Hans Welling, KN 322, e-poŝto
dj4pg@gw.ab6gw.ab6qv.ampr.org. e-poŝto estu nur .txt, ne WORD aŭ MIME-formato bv.

# GRAVA INFORMO

S-ro MOSHE KATSAV, eksa ministro pri turismo kaj parlamentano, membro de la Honora Komitato de la 85-a Universala Kongreso de Esperanto, estis elektita la 31-an de junio, far la Kneset (la israela parlamento), al la posteno de la Prezidanto de Israelo (8-a laŭvice). Li superis la alian kandidaton, nian Altan Protektanton, sinjoron Shimon Peres, en la fina baloto (63 kontraŭ 57 voĉoj).

## VENONTA UK – EKFUNKCIIS

Dum la 85-a U.K. de Esperanto, okazinta en Tel Avivo, la salono de "LAPENNA" estis tro malgranda por ĉiuj kiuj interesiĝis pri venonta U.K. okazonta en Zagreb.

Ĉefan enkondukon pri Kroatio donis s-ro Nikola Rašić, konstanta kongresa sekretario. Partoprenis reprezentantino de "Generalturist" la plej grava kroata turisma agentejo.

S-ino Spomenka Štimec la LKK-sekretariino prezentis membrojn de LKK. Ŝi prezentis ankaŭ du prospektojn pri Zagreb kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj E-poŝtmarkon kaj moneron de 25 kunaoj, kiujn la Kroata ŝtata poŝto kaj Nacia banko lanĉis okaze de 1-a kongreso de kroataj esperantistoj.

Estis prezentito 7-minuta filmo pri Zagreb kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

S-ano Faruk Islamović prezentis lumbildojn pri Zagreb kaj pri la plej interesaj lokoj en Kroatio, kien la kongresanoj ekskursos; nome pri la okcidenta parto de Kroatio, pri la lagoj de Plitvice ktp.

Se ni scios ke la kongreso okazos sub alta protekto de Stjepan Mesić, prezidanto de la Respubliko Kroatio, ne mirigas granda intereso de la ĉijaraj kongresanoj pri la venonta UK, pri kiu oni faris apartajn demandojn (loĝado, klimato, kongresejo ktp.). Respondadis LKK-anoj pri siaj respektivaj laborkampoj.

Davor Grgat (k. n. 670)

La ĉi-jaran kongresan kurieron redaktis por vi Josip Pleadin el Kroatio (k.n. 487) kaj kunhelpis Cvi Šolt kaj Aleks Kerbel el Israelo.

## PLUAJ SUKCESOJ DE INFORMADO

• Ĵaŭde, la 27-an de julio, vizitis nin ĵurnalisto el la ĉefa israela taggazeto, "Ma'ariv". Li interparolis kun pluraj e-istoj. la raporto aperos en la sekvonta kultura revuo de tiu gazeto, venontvendrede.

• En la Tel-Aviva revuo "Ha'ir" (la urbo) aperis 2 sciigoj pri la UK en la sama tago (la 28-an de julio): unu 15-linia raporto, kaj alia sciigo pri la forumo de gegejoj kadre de la kongreso, en la rubriko de gejoj de la revuo.

• Kiam Doron Modan intervjuiĝis ĉe la fama televida programo "Nova vespero" (unua kanalo, la 25-an de julio je la 17h00), kune kun la denaska esperantistino Maja Wandel, li subite ekvidis ekster la studio la infanan stelulinon Hhani Nahhmias. Li tuj konigis al Nahhmias Majan kaj ŝian fratinon Tali. La stelulino entuziasmiĝis pri la ĉarmaj knabinetoj kaj pri la ideo de la Infana Kongreseto, kaj invitis ilin intervjuiĝi post la kongreso.

• La 30-an de julio okazis kelkminuta ero kun Tova Ben-Cvi pri Esperanto, en la Jida programo en la radio. Estis intervjuo kaj kanto en Esperanto.

• Du programoj de po unu horo estas planataj por la radio en Ondo A.

• La flagŝipa evento de nia informado okazis lunde, posttagmeze, kiam skipo de la unua kanalo (programo "Mondrigardo") filmis en la kongresejo por raporteto kiu devas esti dissendita ĉi-vendrede en la unua kanalo iam inter 20h00 kaj 21h50.

• La anglalingva ĵurnalo "The Jerusalem Post" menciis lunde (la 31-an de julio) la "hieraŭ komenciĝintan" kongreson de "Internacia Esperanto-Societo".

• Eksterlandaj kongresanoj kunlaboras: Ni dankas la 2 usonanojn kiuj helpis kontroli la anglan version de la gazetara komuniko, kaj la 2 armenanojn kiuj tradukis ĝin por ni rusen.

## EKSKURSO E6

Post longa tempo mi denove spertis interesan ekskurson, kiu ne konsistis nur el longa busveturado, tagmanĝo, rapida trarigardo de la koncerna loko kaj longa reveturado. Temis pri la ekskurso al la kavernoj de "Bejt-guvrin", kie ni promenadis preskaŭ dum 4 horoj. Unue ni veturis kaj haltis en kibuco "Zora". Post la vizito de interesa kaj unika nacia parko ni daŭrigis al la termala centro "Hamej Yoav", kie ni tagmanĝis. Kelkaj poste baniĝis en varmaj kaj sanigaj akvoj ĝuante la masaĝon per forte ŝprucanta akvo. Malbonŝanculoj estis tiuj kiuj ne havis bankostumon. Tamen estis ebleco aĉeti ĝin surloke aŭ sidi en apuda ĝardeno sub sunprotektiloj kaj trankvile ripozi ĉe lageto. Revene ni traveturis la urbon Ashkelon kaj haltis en la urbo Ashdod por rigardi ŝiphavenon. Dank' al nia gvidanto, s-ro Karpati, ni havis agrablan ekskurson.

Liba Gabalda

## MUZIKA ESPERANTO-LIGO

MEL kunvenis lundon, sed ĉeestis nur 4 interesatoj. Aferoj iom krizas, ĉar profesoro Terziev (k. n. 246), kiu dum multaj jaroj dediĉe gvidis kaj MEL-on kaj la internacian ĥoron, ne povis partopreni ĉi tiun kongreson. Ni ĝojas, ke eĉ ĉi-jare la internacia ĥoro povas bone funkcii dank' al la dediĉo de s-ino Jelena Puĥova, de s-ino Tova Ben-Cvi kaj de tiuj kiuj preparis la muzikon. Se vi proponas helpon al la ligo, bonvolu kontakti la kongresaninon kun la kongresa numero 781.

HELPU UNUIĜON DE KOREIOJ. - Se vi scias nomon kaj adreson de iu nordkorea esperantisto, bonvolu sciigi al LEE Chong-Yeong, interrete: Lee@esperanto.net, fakse: +82-53-165-0881 aŭ poŝte. (k.n. 229, LEE Chong-Yeong).

## KVIZO

Dimanĉon posttagmeze okazis kvizo en kiu konkuris kelkaj "saĝuloj" pri diversaj temoj. La lastan stadion atingis Heide Martha Otto (k. n. 103) el Albanio kaj Giorgio Denti (k. n. 587) el Italio. Ili mirigis la publikon per siaj vastaj scioj. La gajninto fine estis Giorgio ("Ĉampiono de la kleruloj"). La premio estis la rajto aĉeti librojn en la Libroservo de UEA por 100 eŭroj. Jen defio por venontaj LKK-oj.

## ĈU VI KONTROLIS LA RENDEVUAN TABULON ANTAŬ VIA FORIRO HEJMEN?

Kelkaj gekongresanoj ankoraŭ ne prenis la mesaĝojn kiuj atendas ilin jam de kelkaj tagoj. Bonvolu rigardi la rendevuan tabulon antaŭ ol adiaŭi la kongresejon.

La Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj (LSG) gastigis pli ol dudek gastojn, amikojn, kaj anojn dum sia ĉiujara informkunveno lundon en la salono Maschler. Tie estis diskutata la ĉeftemo de gegejoj en la regiono. Ankaŭ tuŝitaj estis la temo Interreto kaj la liga agado. Estis diversaj demandoj, petoj, kaj intervenoj laŭ la temaro.

(Arnold Victor, k. n. 497)

## ATEISTOJ

La 31-an de julio je la 11h00 kunvenis 27 kongresanoj (el deko da landoj) kiuj interesiĝis pri la fakasocio ATEO, kiu celas kunligi esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn. Inter la lasta UK, kie okazis neformala kunsido de interesiĝantoj kaj la nuna, kie okazas fakkunveno enkadre de la kontrakto inter UEA kaj ATEO, iuj el la kunvenintoj klopodis revivigi la asocion, nur per informiĝo ĉe la iamaj estraranoj.

Evidentiĝis, ke necesas novaj kunlaborantaj fortoj. La partoprenantoj de la kunveno proponas novan provizoran estraron: vicprezidanto: CLAUDE NOURMONT (k.n. 659), sekretario: HELGA RAPLEY, kasisto: DIETER ROOKE, redaktoro de "Ateismo": JESUS DE LAS HERAS, helpanto por specifaj taskoj: ANNA LOEWENSTEIN.

Dum la kunveno oni iom diskutis pri la celoj de la asocio. Ne temas, ke ni estas kontraŭ religioj, sed kontraŭ la premoj de religioj en la socia vivo. Ni estu toleremaj, sed nia toleremo havas limojn: ni ne povas akcepti la maltoleremon.

Konkretaj planoj de la asocio estas revivigi la revuon, sendota al ĉiuj konataj adresoj de iamaj kaj nunaj membroj, krei ttt-ejon kaj retliston, kaj post formala reorganizo de la asocio, kontakti samcelajn neesperantistajn asociojn.

Pluaj informoj kaj sinproponoj por kunlaboro ĉe la raportinto.

(k. n. 659)

# DEFIO NE NUR AL AKADEMIANOJ ...

## ĈU LA ESPERANTISTA MOVADO KAJ LA ESPERANTISTOJ MEM ESTUS PRETAJ?

En la publika kunveno de la Akademio de Esperanto venis kiel preskaŭ ĉiujare la demando al la Akademio pri la nekongrua sistemo de landaj nomoj kaj popoloj kaj pri la logiko en la uzado de oficialaj ŝtataj nomoj.

Kiel Humphrey Tonkin bone rimarkis, en la tempo de Zamenhof oni pensis nacie kaj ekiris de la ideo de homogena kultura kaj lingva nacia ŝtato, kiu ne faris diferencojn inter ŝtat-anoj kaj nomoj de etnoj aŭ geografiaj popoloj, malgraŭ en tiama epoko tio jam ne estis la realo.

Rilate al la nuna evoluo de ŝtatoj kaj federacioj, ne nur en Eŭropo, enhavante plurajn etnojn aŭ popolojn, mi lanĉis en tiu publika diskuta rondo de la Akademio la sekvan defion:

Pensu - por unu momento - ke iu internacia instanco aŭ la Europa Unio decidas morgaŭ organizi ide-konkurencon pri komuna lingvo sur bazo de universala planlingvo. Samtempe oni publikigas kriteriojn al kiuj tiu planlingvo devas respondi; krome la bone konataj kriterioj kiel esprim-, evolu- kaj facila lern-kapableco, estas do kriterioj al kiuj la internacia lingvo Esperanto ne respondas kaj pri kiuj ekzistas ene de la Esperantista movado diskutoj kaj disputoj ekde jaroj.

Tiu defio ne estas teorio aŭ nova ideo, ĉar jam ekzistas franca asocio "Unite" kiu demandas, krome modelon federalisman, demokratan decid-proceson pri komuna lingvo en Eŭropo laŭ specifaj kriterioj (interalie, tiu movado pensas, ke Esperanto malsukcesis en la pasinteco, sed ĝi povas partopreni en tiu demokrata proceso ankaŭ) - Do, se finfine spertulaj komisionoj prezentas plurajn proponojn de universala planlingvo, la demokrata selekto fariĝas laŭ la anoncitaj kriterioj.

Pensu nun, ke unu el tiuj kriterioj estu la kondiĉo por uzi latinan alfabeton sen iu ajn supersingo; la motivo de tiuj instancoj estas simpla kiel universala; supersignoj en la diversaj lingvoj donas diversajn prononc-manierojn en ĉiu lingvo kaj ne eniras en la logikon de facila universala planlingvo.

La dua kriterio estu la kondiĉo uzi la oficialajn nomojn de ŝtatoj, landoj, geografiaj nomoj ktp. en la originala(j) lingvo(j) de la koncerna ŝtato, regiono aŭ komunumo, eble trans-skribita en latinaj literoj laŭ la oficiala prononcado; la motivo ankaŭ estas federala, universala kaj simpla; oni ne nur akceptas la federalan principon (diversecon en la unueco aŭ demokratio en diverseco), ke ĉiu kultura aŭ lingva grupo konservas siajn proprajn oficialajn nomojn tiamaniere retrovi sian kulturan kaj lingvan identecon en la internacia komunumo, sed ankaŭ permesas tiamaniere konservi la alfabetan ordon en internaciaj organizoj aŭ internaciaj kunvenoj, listoj, parol-ordoj ktp.

Samtempe tiu universala kaj federala solvo de uzado de originalaj nomoj faciligas la inter-kulturan komunikadon, ĉar, se fremdulo vojaĝas en la lando mem, li aŭ ŝi nur trovas survoje ŝildojn al urboj aŭ vilaĝoj aŭ en la stacidomoj aŭ flughavenoj direkto-indikilojn en la lingvo(j) de la lando aŭ hodiaŭ, eĉ pli ofte tiujn nomojn tradukite en la angla lingvo. Preskaŭ ĉiuj bone konas la problemon de miskompreno, se iu fremdlingvano tradukas en diskuto oficialan nomon de bone konata urbo, sed nerekonebla en la formo de tiu fremda lingvo.

Por tiuj-ĉi motivoj la Eŭropa Unio (Komunumo) kiu nuntempe rekonas 11 oficialajn lingvojn, uzas ekde sia komenco la oficialajn nomojn en la originala(j) lingvo(j) de la koncerna ŝtato en specifaj kampoj kiel alfabeta ordo kaj ŝildoj de landaj delegitoj, en kunvenoj kaj statistikaj tabeloj, geografiaj mapoj, listoj kaj adresoj ktp.

La defio estas klare videbla, ne nur al la akademianoj:

Aŭ, la spertuloj en nia movado adaptas la lingvon de doktoro Zamenhof al la nuntempaj kondiĉoj de internacia lingvo kiu plenumas la teknikajn kaj politikajn kriteriojn por universala planlingvo, aŭ, la Esperanta movado restos lingva sekto kiun la nuna socia kaj mondskala evoluo preterpasos!

Kial ne organizi opinian enketon inter la esperantistoj en la Esperanto bulteno pri tiu defio?

La akademianoj instigis pli viglan diskutadon en la Esperanta movado; jen, la defio estas lanĉita por prepari la lingvon de Zamenhof de 1887 al la pli komunikad-intensa kaj pli identec-konscienca societo de nia hodiaŭa mondo!

Michael Cwik, Kongresa numero 1175